# KUN PUTIN PACO NE ESTOS EBLA, SEN PUTIN EBLE JES

### Rusio kaj Ukrainio pagas tre altan prezon por la krima "frata" milito inter la "malbono" kaj "bono"

**Sed ekzistas la risko, ke la malbono povus venki, se la ukrainoj perdos kaj la rusoj gajnos la militon. Ĉi tia scenaro nepre devas esti evitita.**

*Okaze de la Internacia Tago de la Paco 2022 kaj de la Internacia Tago de la Neperfoto 2022*

Per sia nova milita atako kontraŭ Ukrainio surbaze de naciismaj, ŝovinismaj kaj imperiismaj instigoj Putin, Kremlo kaj Rusio ne nur kaŭzis grandegan materian kaj nematerian damaĝon al la slava "frata lando" – la kostoj povus sumiĝi je bilionoj da dolaroj. La putinistoj prenis altan riskon, pri kiu ili verŝajne eĉ ne vere konsciis. La diktatoro en la Kremlo kaj la obeemaj armeaj gvidantoj de Rusio evidente ne atendis, ke ilia „speciala militoperaco" okazos ne nur kelkajn tagojn, sed, transformiĝante en veran militon, daŭros multe pli longe kaj tragike kostos la vivon ankaŭ de miloj da propraj soldatoj kaj multnombraj civiluloj.

## Ciferoj ilustras la tragedion

Kelkaj ciferoj ilustru tiun eksterordinaran tragedion, kiu samtempe reprezentas gigantan dilemon pro gravegaj miskalkuloj de la Kremla bando. Meze de julio la usona sekreta servo CIA komunikis, ke ĝi supozas, ke 15 mil rusaj soldatoj estis mortigitaj. En aŭgusto la Pentagono parolis pri 80 mil rusoj, kiuj povis esti mortigitaj aŭ vunditaj. Laŭ la Ĉefa armea stabo de Ukrainio ĉirkaŭ 42800 rusaj soldatoj perdis sian vivon antaŭ la 10a de aŭgusto. La 6an de septembro la nombro de mortigitaj rusaj soldatoj atingis laŭ indikoj de la sama ukraina fonto la limon de 50 mil. Londono supozis, ke la rusoj perdis 25 mil homojn, UN parolis pri pli ol 5500 civilaj mortoj. Laŭ ukrainaj armeaj indikoj la rusoj suferis la jenajn perdojn en julio: 5280 soldatojn, 191 tankojn, 136 artileriajn sistemojn, 6 ĉasaviadilojn. Krome ekzistis perdoj ĉe provizoveturiloj, helikopteroj kaj aerdefendaj sistemoj. En aŭgusto la ukraina ĉefkomandanto Zaluĵni anoncis en la televido, ke 9 mil soldatoj estis mortigitaj je la propra flanko. Rusia reprezentanto diris, ke estas same multaj sur la rusa flanko. Tamen la preciza nombro de mortigitaj kaj vunditaj soldatoj ne estas publike konata. Antaŭ iom da tempo la ukraina prezidento Zelenski taksis, ke 50-100 ukrainaj soldatoj pereas ĉiutage en la batalo. La nombroj, kiuj ne povas esti sendepende kontrolitaj kaj estas traktataj kiel ŝtata sekreto kaj en Ukrainio kaj en Rusio, draste varias. Estas malfacile diri, ĉu la prezentitaj ciferoj estas troigitaj aŭ realismaj, despli ke ili rapide perdas sian aktualecon. Ĉiukaze la armeaj perdoj sur ambaŭ flankoj devas esti sufiĉe grandaj.

Cetere elekto de datumoj pri mortigitaj rusaj soldatoj montras, kiuj specoj de armeanoj estis mobilzitaj por la milito, t.e. "elektitaj" por doni sian vivon al la patrujo. La plej multaj mortigitaj rusiaj soldatoj estis inter 18- kaj 29-jaraĝaj. Ili ofte inkludis junulojn el pli malriĉaj periferiaj regionoj aŭ etnaj malplimultoj, ekzemple Dagestano kaj Burjatio, kiuj registris proksimume 10% de la viktimoj. Rusaj soldatoj rakontis al eksterlandaj amaskomunikiloj kiel ili spertis la invadon de Ukrainio. Iliaj raportoj atestis pri kompletaj malmoraliĝo kaj sovaĝiĝo, pri humiligo, vasta mensogado kaj ekstrema brutaleco en la propraj vicoj.

La rusiaj gvidantoj ankaŭ kaŭzis nemezureblan homan tragedion kun neantaŭvidebla humanitara katastrofo kaj senprecedenca ondo de rifuĝintoj. Laŭ indikoj de UN pli ol 5

milionoj da ukrainaj civitanoj forfuĝis de sia lando antaŭ la 9a de majo, dum 7,7 milionoj da rifuĝintoj dislokiĝis interne de la lando.

### Unua bilanco: Katastrofaj efikoj por Ukrainio kaj Ruslando

Grandparto de la okcidenta landaro kaj UN plenforte kondamnis la rusan invadon de Ukrainio en ĉi-rilata rezolucio komence de marto. Tiel Ruslando iĝis eĉ pli izolita internacie, la reputacio de Rusio ege difektiĝis, Moskvo fakte nur tenas kontaktojn kun la estroj de kontraŭ-okcidentaj ŝtatoj (kiuj palavras pri justeco). Ankoraŭ ne klaras kian efikon havos la okcidentaj sankcioj por la ruslanda ekonomio. Kiel oni povis legi en publikigita Yale-studo, la sankcioj jam nun faris grandegan damaĝon al la ekonomio de Rusio. La importoj draste reduktiĝis, eĉ el Ĉinio (kiu ne subtenas la sankciojn). La enlanda produktado en Rusio kvazaŭ "plene haltis", la aŭtoindustrio plej suferis. Pro la sankcioj urĝe bezonataj pintaj teknologioj kaj detalpecoj ne plu povas esti liveritaj al Rusio kaj do mankos por ripari maŝinojn aŭ varti aviadilojn. Kvankam partoj de la ruslanda ekonomio estas praktike paralizataj, ĝi evidente ankoraŭ ne kolapsis kaj montriĝas rezistebla. La eksplodintaj prezoj de la nafto kaj gaso ŝajne profitigis la Kremlon per pli altaj enspezoj. Tamen estas neklare, ĉu la Kremlo havas aliron al ĉi tiu mono, ĉar diversaj bankkontoj estas blokitaj. Putin konfesis, ke la okcidentaj sankcioj kaŭzis problemojn al la ruslanda ekonomio, sed la rusiaj gvidantoj klopodas kaŝi kaj bagateligi la aperintajn problemojn antaŭ la mondo kaj la propra popolo kaj provas trompi la Okcidenton per konstantaj trukoj kaj senĉesaj grandstilaj mensogoj, pro kio Ruslando estis nomata ankaŭ „imperio de la mensogoj“. Ĉiukaze, laŭ prognozoj la malneta enlan-da produkto malpliiĝos kaj antaŭvideble atingos negativan saldon sur la skalo ĉi-jare. Fakte la falo de la ruslanda ekonomio komenciĝis plej malfrue en 2014 post la aneksado de Krimeo kaj la posta milito en Donbaso. Post la militeksplodo en februaro 2022 la plimulto de okcidentaj entreprenistoj, investantoj kaj akciposedantoj retiriĝis el Rusio kaj adiaŭis ĝian merkaton.

Miloj da civitanoj forlasis Rusion pro timo, malespero aŭ kolero, turnante la dorson al sia patrujo, la etoso en la lando estas mizerega. Ĉian kritikon pri la barbara milito kontraŭ la najbara lando la rusiaj potencorganoj, kiuj ne plu konas pardonon, tuj sufokas en siaj ĝermoj. La agresema kaj maljusta ruslanda rabisma ŝtato triumfas kaj prosperas. Kiel en Ĉinio, Irano aŭ Sirio, kun kies registaroj la Kremlo estas ligita en amikaj rilatoj, la homaj rajtoj en Rusio estis praktike suspenditaj.

### Ukrainio devis/os esti likvidita

La rusaj deklaroj kutimas esti nebulaj kaj enigmaj, sed pri Ukrainio ŝajnas regi klareco. Laŭ diversaj klarigoj de Putin intertempe evidentiĝis, ke li volas disbati Ukrainion kiel sendependan ŝtaton kaj enkorpigi ĝian teritorion en novan malnovan ruslandan imperion. Do kiel ĝi ekzistas nuntempe, Ukrainio devos malaperi. Laŭ la plano de Putin tiuj teritorioj estas konkerendaj, en kiuj loĝas plimulte ruslingvanoj kaj kiuj grandparto apartenis al la „historia Ruslando“. Esence koncernataj de tiuj konkeraj planoj estas krom Donbaso orienta kaj suda Ukrainio kun la urboj Ĥarkovo en la nordoriento kaj Ĥersono kaj Odeso en la sudokcidento. Fortranĉita de la Nigra Maro, la teritorio de la apenaŭ plu ekzistebla ukraina restŝtato devus ŝrumpi al sensignifa izolita landeto konsistanta el Kievo – kvankam ankaŭ ĝi estas daŭre konsiderata kiel malnova rusa urbo – kaj limigita al kelkaj okcidentaj regionoj kiel Volhinio, Transkarpatio kaj Bukovino kun la urboj Lvivo, Uĵhorodo kaj Ĉernivco, kiuj iam estis partoj de la aŭstra-hungara imperio aŭ de Pollando aŭ Rumanio. Kun la konsento de Moskvo, Pollando, Hungario kaj Rumanio povus tiam volonte engluti ĉi tiujn teritoriojn, kiel sarkasme diris iuj funkciuloj de la Kremlo. Laŭ tiu vizio Ukrainio eĉ tute malaperus de la mondmapo kiel sendependa ŝtato kaj lando, same kiel la ukrainoj kiel apartaj etno, popolo kaj nacio. Putin, blindigita

de la propra kredo, kiu ekskludas aliajn konvinkojn kaj konceptojn, opinias, ke rusoj kaj ukrainoj ĉiuokaze estas unusola komuna popolo. Modela ekzemplo por moderna genocido, pri kiu ne nur la ukrainoj konstante atentigas.

Por memoro estu reatentigite pri tio, ke post la sendependiga deklaro de Ukrainio disde Sovetunio de la 1a de decembro 1991, kiu estis subtenita de ukraina referendumo, kiu finiĝis favore al tiu ĉi sendependeco per 90,3% de la voĉoj, jam la sekvan tagon Ukrainio estis oficiale rekonita de Rusio (kaj aliaj ŝtatoj). La 5an de decembro 1991 la traktato de 1922 pri la formado de Sovetunio estis nuligita fare de la ukraina parlamento. Tri tagojn poste la konceraj ŝtataj gvidantoj subskribis la interkonsenton inter Rusio, Belorusio kaj Ukrainio pri la starigo de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj (SNG), al kiu tiam aliĝis ok aliaj ŝtatoj. Cetere Ukrainio estis membro de UN kune kun Belorusio ekde oktobro 1945 kiel konsistiga respubliko de Sovetunio. En aŭgusto 2012 ekzistis 132 eksterlandaj diplomatiaj misioj en Ukrainio, de kiuj 73 misioj estis malfermitaj en Kievo, dum la reprezentejoj en Moskvo kaj Kievo estas reciproke provizore fermitaj.

2e: En ĥoro kun aliaj nukleaj potencoj Rusio devigis sin en decembro 1994 kadre de la tiel nomata "Budapeŝta Memorando" respekti la suverenecon kaj ekzistantajn limojn de Ukrainio (same de Belorusio kaj Kazaĥio), se tiuj landoj rezignas pri nukleaj armiloj, kion ili faris.

3e: La 28an de majo 2002 en la gazetara konferenco okazinta okaze de la starigo de la "Konsilio NATO-Rusio", Vladimir Putin ne pridubis la ŝtatan aŭtonomecon de Ukrainio kaj eksplicite emfazis, ke Ukrainio estas suverena ŝtato. Li diris, ke Rusio kaj Ukrainio estas „du proksimaj ŝtatoj“, kiuj eliris el la „familio de Sovetunio“. La duflankaj rilatoj „aparte pozitive evoluas“. Krom tio Putin diris, ke Ukrainio ankaŭ havas „la rajton elekti sian vojon certigi la propran sekurecon“. La rusa prezidento eĉ ŝajnis konsideri „tute ebla“ la partoprenon de Ukrainio en la formato fondita en Romo – li vidis nenion, kio povus tiurilate malheligi la rilatojn inter ambaŭ ŝtatoj“. 20 kaj 30 jarojn poste ĉi tiuj garantioj kaj konvencioj evidente ne plu validas – kun aŭ sen NATO-ekspansio orienten. La opinioj de la rusoj ŝanĝiĝis. Krom la Baltaj Ŝtatoj, kiuj estas speciala kazo, eĉ ne unu postsovetia ŝtato estis akceptita de NATO, dum aparte la aliĝo de Ukrainio al NATO estis ĉiam ekskludita.

Ĉar la celoj de la militplanado de la Kremlo povas ŝanĝiĝi laŭ la aktualaj cirkonstancoj, estas malfacile taksi kiuj intencoj estas efektive validaj kaj realigeblaj. Ĉar montriĝis, ke Ukrainio ne povas esti konkerita en tri tagoj, la konkero verŝajne efektiviĝos en etapoj, se entute. Tiu ĉi strategio povus ankaŭ inkluzivi la planon senhomigi la kamparon kaj urbojn per konstantaj armeaj atakoj por pli facile transpreni la terenon, forpeli aŭ deportadi la ukrainan loĝantaron por poste loĝigi ĝin per etnaj rusoj el Rusio. La rusigo de la konkeritaj areoj jam okazas – per instalado de rusaj administracioj, disdono de rusaj pasportoj kaj enkonduko de la rusa mono. Tiuj (novaj) loĝantoj kun rusaj pasportoj tiam devus organizi kaj partopreni simulitan referendumon kaj aŭtentigi la aneksadon de la konkeritaj areoj fare de Rusio. Kun demokratio ĉio tio havas cetere absolute nenion komunan.

Tiamaniere novaj teritorioj estas konkeritaj de Rusio kaj "reunuigitaj" kun la "patrujo". La ekzemplo de la senskrupula aneksado de Krimeo en 2014 montris kiel la proceduro de la rusoj funkcias. Dum en Krimeo ne okazis vera sanga milito, la areoj de la ukraina Donbaso estis tamen konkeritaj per kruda milita perforto kun la rezulto de miloj da mortintoj, vunditoj, rifuĝintaj kaj deportitaj homoj, kiuj vivis en tiuj lokoj. Tiu ago estas nenio alia ol "klasika" krimo laŭ internacia juro (cetere kun Kosovo, kiun Moskvo konstante aldonas kiel komparon, havas nenion komunan).

Ankaŭ en Ukrainio la milito fariĝis ia rutino. Dume la ukraina armeo sufiĉe sukcese defendis la frontlinion en la oriento, kvankam ĝi ne sukcesis rekonkeri Donbason. Por aldoni alian ciferon, por la "unua fazo" de la rus-ukraina milito en Donbaso ekde 2014 estas kutime citita la nombro de 13-14 mil mortintaj viktimoj, laŭ la fonto.

**La agresmilito de Rusio kontraŭ Ukrainio malsukcesis**

Kion Rusio atingis post 6 monatoj da milito? La vivbazo de sennombraj ukrainoj estas ruinigita kaj la infrastrukturo de la Donbaso kaj aliaj lokoj en Ukrainio estas grave difektita. Laŭ takso 20% de la teritorio de Ukrainio estas okupata (kvankam ne tute kontrolata) de la ruslanda armeo kaj ĉirkaŭ triono de la ekonomio de Ukrainio estas grave lezata pro konstanta rusa militado. La ukraina ekonomio alproksimiĝas al kolapso, kaj la lando povas pluvivi nur per okcidenta financa helpo. Okazas mortiga blokiĝo en Ukrainio. Sed post 6 militaj monatoj oni devas konstati, ke Rusio ne atingis la proklamitajn militcelojn en Ukrainio, malgraŭ kontraŭaj asertoj de la Kremlo, ke la "speciala milita operaco", kiel ĉi tiu barbara milito kontraŭ Ukrainio estas nomata, progresas laŭplane. Ukrainio ankoraŭ ekzistas kiel ŝtato, eĉ se iom malfortigita, kvankam ĝi devus esti forigita de la mapo, kaj ĝiaj ŝtatgvidantoj ne povis esti forpuĉitaj, malliberigitaj aŭ mortigtaj kiel Putin antaŭvidis. Nu la areo de Ukrainio simple estas tro granda por esti konkerita kaj regata sub la kondiĉoj de la heroeca ukraina rezistado kaj evidente nesufiĉe bona stato de la rusa armeo, kiu batalas en Ukrainio. Kvankam la rusoj povis forpafi ne malmultajn "novtipajn" hipermisilojn kaj superraketojn kontraŭ Ukrainio, kiujn ili antaŭe fanfarone anoncis kaj produktis, ne estas klare, ĉu la armea supereco de Ruslando konsistas plejparte el blufo de Putin por imponi kaj timigi la malamikojn. Ŝajnas, ke la potenco de la rusa armeo ĝenerale estis supertaksita dum longa tempo. Tamen la detrua potencialo de Ruslando ne estu subtaksata. Rusio pruvis kion ĝi kapablas: detrui, mortigi, lezi, neniigi, ekstermi … Proksimume tiel faris ankaŭ la nazioj.

Ŝajnas, ke ankaŭ Putin, blindigita de la iluzia kredo pri la grandeco de Ruslando, mistaksis la forton de sia armeo, kiun li sendis al Ukrainio, kaj subtaksis la volon de la ukrainoj defendi iliajn liberecon kaj sendependecon. Al tiu rusa armeo evidente mankas sufiĉe da profesiaj soldatoj, kiuj estas bone ekipataj kaj scias kion fari, dum la ukrainaj soldatoj estas pli lertaj kaj moviĝemaj (kvankam ili estas trafitaj de amasa rusa artilerio kaj probable multnombre pereas sur la batalkampo). Putin ankaŭ ne kalkulis pri la "kolektivaj" persistaj reagoj de la de li tiel malestimata "dekadenca" Okcidento subteni Ukrainion per kontraŭ-rusiaj sankcioj kaj armilliveroj al Kievo, precipe flanke de Usono, dum Eŭropo helpas mone kaj morale. Novaj rusaj teritoriaj gajnoj estas minimumaj. Oni demandas sin, kio okazis kaj kial la rusoj (feliĉe) ne povis konkeri pli da teritorio. Ĝis nun la milito de Putin kontraŭ la armee malsupera Ukrainio devas esti konsiderata kiel fiasko, kvankam ĝi ankoraŭ furoras kaj fino ne videblas. La ukrainia krizo ankoraŭ ne finiĝis, ĉar oni ne povas diri, kiajn perfidajn krimojn Putin ankoraŭ kapablos elpensi kaj ordoni kaj ĉu li povos malstabiligi la situacion en Okcidenta Eŭropo.

Putin maltrafis siajn militcelojn en duobla senco: La ukrainaj armeaj fortoj ne povis esti eliminitaj kaj la ukraina naciismo aŭ patriotismo ne povis esti malaperigita kiel laŭtvoĉe anoncite kaj promesite de Putin. Lia aserto, ke Ukrainio estas faŝisma diktaturo, estas pura elpensaĵo, fikcio de la rusa propagando, kiu ankaŭ asertas, ke Ukrainio estas nura marioneto de Usono kaj de la Okcidento. En ambaŭ kazoj efektive okazis la malo. La ukraina armeo potenciĝis kaj la ukraina memkonscio fortiĝis, ukrainaj radikalaj dekstruloj aŭ t.n. Bandera-faŝistoj ludas neniun aŭ marĝenan rolon kaj povis esti neŭtraligitaj. Prezidento Zelenski estas juddevena. Krom tio NATO ne povis esti forpelita de la ruslandaj limoj. Male, Finnlando kaj Svedio volas nun aliĝi al NATO. Tio eĉ estas triobla fiasko por Putin kaj liaj fanfaronaj milit-propagandistoj, kiuj ne hezitas minaci per apliko de nukleaj armiloj. Estas do malfacile antaŭdiri, kiaj realaj rimedoj restis al la Kremlo por gajni tiun militon. Pliiĝas la duboj, ke la rusoj povus sukcesi. La militlaca kaj malbone ekipata rusia armeo, kiu enpenetris Ukrai-nion por detrui kaj konkeri la landon kaj mortigi la homojn, estas alfrontita kun ĉiam pli efikaj armiloj, kiuj estas liveritaj de la Okcidento, precipe Usono, kaj kiujn la lerta ukraina militistaro povas apliki kontraŭ la malamiko. Krome Putin laŭdire estis misinformita de siaj sekretaj servoj kaj armeaj konsilistoj pri la evoluo de sia militiro kontraŭ Ukrainio, kiu ŝajne estis tute malĝuste planita kaj improvizita, dum li mem troviĝas en speco de veziko, kiu povas

krevi en ajna momento. Estas do pli ol dubinde, ĉu havas sencon sendi pliajn 50-100 mil rusiajn soldatojn al Donbaso por teni ĝin. La nombro de viktimoj iĝas pli kaj pli granda. La rusia registaro prefere okupiĝu pri la problemoj en la propra lando, kie la aferoj aspektas sufiĉe malbone.

Pro la perdita milito en Ukrainio Putin kaj la rusia registaro devus veni al la konkludo, ke estus pli saĝe demisii kaj forlasi la politikan scenejon, se Ruslando ne estu ankoraŭ pli forte tirita en la abismon. La momento por tiu demisio povus esti nun.

Cetere malsukcesis ankaŭ la militpreventa politiko de la Okcidento, kiu ne povis eviti la eksplodon de la rusa milito kontraŭ Ukrainio en 2014 aŭ 2022. En tio oni devas vidi klaran malforton de la Okcidento, se oni volas paroli pri eraroj de la Okcidento, eĉ se ĝi disponas pli superaj armiloj, kiuj povus havi ruinigajn, mortigajn sekvojn por Rusio, se ili estus aplikataj.

## Ankaŭ aliaj najbaraj landoj sentas sin minacataj de la rusia agreso

Kiel oni supozas en la koncernataj landoj kaj ne nur tie, en posta fazo de la rusa agreso povus sekvi verŝajne ankaŭ la vico de Moldavio kaj Belorusio, kiuj devus esti konektitaj al Rusio kiel integraj partoj de la regno. Kiel la Kreml-lojala popkantisto Gazmanov kantis en Moskvo en marto 2022: Rusio, Ukrainio, Belorusio kaj Moldavio estas unu komuna lando. Nu la "integriĝo“ de Belorusio ja preskaŭ jam okazis, kvankam la ruzega Lukaŝenko ĝis nun sukcesis eviti la perdon de la tuta suvereneco de sia ŝtato kaj ludas kun Moskvo de jaroj kaj jardekoj la ludon de kato kaj muso – sed ankoraŭ kiel longe tio povas funkcii?

Laŭ la imagoj de la rusoj la limoj de la nova ruslanda imperio estus formitaj de la riveroj Dnestro, Bug kaj Spruĉ, diris Andrej Illarionov. En ĉi tiu scenaro la ekzisto de Pollando kaj la Baltaj Ŝtatoj, kiujn multaj rusoj malkaŝe nomas "rusa tero", povus esti en danĝero. La milito de Rusio kontraŭ Ukrainio, kiun Moskvo volas subkompreni ankaŭ kiel militon kontraŭ la okcidenta mondo, ankaŭ signifas por la Okcidento, ke Moskvo ne plu akceptas la malnovan ordon en Eŭropo, kiel ĝi estis establita almenaŭ depost la orienta ekspansio de NATO en 2004. Ĉar UN, kiu estas subfosita de amaso da kontraŭ-okcidentaj ŝtatoj, en sufiĉa grado de Ĉinio, verŝajne ne estos fidinda, Okcidento, unuavice Usono, devus rapide helpi al tiuj ŝtatoj. Moskvo do probable timos ataki ĉi tiujn landojn, se en la Kremlo ekzistus eĉ nur malgranda spuro de skrupulo, respekto kaj realeco, ĉar en la NATO-teritorio Rusio devus kalkuli kun serioza milita rezisto, se ĝi atakus ĝin, despli ke al Rusio verŝajne mankus la militaj kaj logistikaj rimedoj, la fortoj kaj kapabloj por okupi, regadi kaj kontroli tiujn landojn longdaŭre. La nura damaĝo, kiun Rusio ankoraŭ povus kaŭzi al la atakotaj landoj, estus fari grandegajn materiajn detruojn, kiel ĝi demonstris ĝin en Ukrainio. Krome oni devus atendi novan gravan humanitaran katastrofon. Ĉio ĉi ŝajnas esti kion Putin intencas kaj kapablas fari por devigi la Okcidenton surgenuiĝi antaŭ Rusio (kion ĝi nature neniam farus). Blindigita de reakciaj grandrusiaj imagoj kaj revoj, kiujn li delonge flegas kaj klopodas realigi, lia granda historia plano estas detrui kaj faligi la malnovan, liberecan kaj demokratian Eŭropon kaj restarigi la ruslandan imperion almenaŭ en la limoj de Sovetunio (nature sen komunismo) kiel egalan superpotencon apud Usono (kaj Ĉinio). Sed tiu ĉi plano ĝis nun malsukcesis kaj la homaro estas bone konsilata entrepreni ĉion, por ke ĝi ne realiĝu. Ruslando estas iusence *la unika siaspeca* "kontraŭ“ aŭ "anti-civilizov, ĝi estas nek Eŭropa nek Azio, nek Okcidento nek Oriento; temas pri sinistra, malmoderna kaj kontraŭhoma, maljusta, sovaĝa kaj krima formaĵo, kvazaŭ nigra skatolo, en kiu la bono kaj malbono konstante ŝanceliĝas en grandioza dilemo kaj kiu servas ĉefe al la riĉiĝo kaj bonfarto de malgranda potencavida kleptokratia elito de danĝeraj kaj egoismaj mafiuloj, dum la plimulto de la homoj mizeras kaj estas subpremataj (kvankam ne ĉiuj opinias aŭ sentas, ke ili estas subpremataj, ĉar al ili mankas tiu konscio). Jurj Levada trafe priskribis la tipon de la *"sovetia homo"* (homo sovieticus), kiu en la postsovetia erao fariĝis la *"ruza, perfida, elturniĝema“* (lukavyj) homo, kiu vivas en tiu lando.

Ci tiun fenomenon de la mentaleco Orvelo nomis en sia mondfama romano "1984", kiu en originaleca maniero trafe analizis la stalinisman totalismon, *"duobla pensado"* kaj *"duobla parolado"*, dum en Okcidento oni parolas pri *"duobla moralo"*. Laŭ Lev Gudkov, posteulo de Levada, tiu duobla mentaleco kaŭzas, ke rusoj povas esti kaj lojalaj kaj malobeemaj, kaj agresemaj kaj kompatemaj, kaj fieraj kaj malcertaj. La stereotipa personeco, kiu formiĝis en Sovetunio, do evidentiĝis mirinde longdaŭra kaj stabila. Ĉi tiu sistemo de konscio estas facile manipulebla, sed ankaŭ malfacile ŝanĝebla. Homoj en Rusland do troviĝas en embarasa situacio inter vero, memtrompo kaj kompromiso.[1]

Ŝajnas, ke la stalinismo ne tute mortis en Rusio, kie tiu *"duobla pensado"* kaj *"duobla parolado"* kiu estas akompanata de sistemeca mensogado, denove plene prosperas en Rusio de Putin. La nuntempa reĝimo evidente montras faŝismajn trajtojn, kiuj estas parencaj al la stalinismo, kvazaŭ kiel ties ĝemelo de "totalisma" sistemo, kiun Hannah Arendt elstare analizis. Eĉ en la postsovetiaj ŝtatoj neniu deziras denove aparteni al la ruslanda imperio, kiu kaŭzis tiom da malbono al la homaro, pro kio ĝi, precipe la sovetunia versio, estis nomata de la usonanoj „imperio de la malbono“. Karakteriza por la rusa psikologio estas, ke rusoj ne toleras projekton en sia najbareco, kiu estas pli sukcesa kaj prospera ol en la propra lando, kie tia projekto fiaskis – do la atingoj de la najbaro ne havu ekzistorajton kaj prefere estu detruitaj.

La malamo kaj venĝemo de tiu "per ĉiuj akvoj lavita" iama KGB-spiono, kiun Garri Kasparov pritaksis en sia libro de 2015 ekstreme malica kaj danĝera ul´, kies krima karaktero evidentiĝas kaj iĝas konata, ŝajnas senlimaj, precipe kontraŭ la Okcidento, kiu laŭdire humiligis, ofendis kaj perfidis lin kaj nun celas detrui Rusion. Tial en la intereso de la monda paco necesas, ke la agresoj de Rusio kontraŭ ĝiaj najbaroj estu ĉesigitaj kaj malhelpataj kun daŭra efiko.

Tamen la aserto, ke la Okcidento humiligis Rusion aŭ ke Rusio fariĝis viktimo de la Okcidento, eble posedas emocian elementon el rusa vidpunkto, sed servas grandparte al la kaŝado de propraj eraroj, mankoj kaj maltrafoj. Verdire ĝi estas bizara infaneca fantazio de politikisto, nomata Putin, kiu sentas sin minora kaj ofendita laŭ slava sentomodelo (kiu en Okcidento ne estas konata). Ĉi tiu malkredinda palavro povas ludas rolon kiel popolisma-demagogia preteksto por kritiko, agresoj, venĝo, militado, subpremado, persekutado kaj grandskala krimado kaj kiu povas esti utiligata kiel plumpa kaj cinika argumenta propaganda armilo. Valoron en si mem ĝi ne havas.

Rusio finfine agnosku, ke a) Eŭropo kaj la Okcidento ne kondutis malamike al Rusio post la fino de la Malvarma Milito, sed male helpis al ĝi ĉiurilate kaj ĉiumaniere rekonstruiĝi kiel moderna ŝtato (laŭ okcidenta orientiĝo). Neniu diktis aŭ trudis siajn mondkoncepton kaj valorojn al Rusio. Tamen se oni volis aparteni al internacia organizo (kiel UN, IMF, G7, eŭropaj institucioj, ktp.), oni devis respekti iliajn regulojn. Ĝuste Putin kaj liaj rusaj mafiaj kunuloj profitis ĝuste el ĉi tiuj reguloj kaj valoroj antaŭ ol ili komencis misuzi, malakcepti, kontraŭbatali, misfamigi kaj turni ilin en sian malon. b) La sendependiĝintaj ekssovetiaj respublikoj ne plu volis vivi en komuna ŝtato kun Ruslando, sed elektis proprajn politikajn kaj armeajn aliancojn aŭ aliĝis al NATO pro timo esti trafita de la rusa minaco. Ŝajnas, ke la nova malferma agresmilito de Rusio kontraŭ Ukrainio plene pravigis iliajn timojn kaj historiajn decidojn. Se Ukrainio estus membro de NATO, ĝi verŝajne eĉ ne estus atakita de Ruslando. La katastrofo, kiun Rusio aranĝis en Ukrainio, estos ŝoka leciono por ĉiuj aliaj postsovetiaj respublikoj ĉe la rando de Rusio, kiuj devos veni al firmaj konkudoj, se ili ne volas perei kiel sendependaj kaj memstaraj ŝtatoj.

El rusa vidpunkto la Okcidento eble faris erarojn en sia traktado de Rusio, kio kaŭzis seniluziiĝon kaj frustriĝon en Rusio, tiel ke la reciproka malfido ne malaperis malgraŭ granda bonvolo sur ambaŭ flankoj. Sed tio ne estis la problemo de la Okcidento, kiu faris tion, kion ĝi povis

[1] Laŭ Joshua Yaffa, Between Two Fires, germana eldono (Die Überlebenskünstler), prologo.

kaj volis fari en la kazo de Rusio, kiu estis ege malfacila kazo. Ĉio alia devis esti lasita al la enlanda politiko, kaj ĉi tiu estis fundamente ŝanĝita sub Putin ekde 2000. Do la kulpon pri la posta evoluo de Rusio ne portas la Okcidento, sed nur Putin kaj la rusoj mem, kiu/j rekondukis sian landon en la aŭtokratecan totalisman pasintecon, konstante reelektante tiun ĉi prezidenton (nature ne sen falsado de la balotoj!) por teni lian povon kaj lian reĝimon, kiu probable estus forbalaita sub realaj demokratiaj kondiĉoj verŝajne plej malfrue en 2012.

La veraj eraroj do ne estas serĉendaj en la helpo al Rusio (financa helpo, demokratiigo, ktp.), – kvankam tiu helpo por apogi la demokration en Rusio estis nesufica – aŭ en la orienta ekspansio de NATO, kiu estis eksplicite dezirata de la koncernaj ŝtatoj, aŭ en la bombado de Serbio en 1999, kvankam povas esti, ke tiu unuflanka atako de Usono/NATO tute ne plaĉis al la rusoj, same kiel la anonco de Usono, ke ĝi konsideras sin la sola reala mondpotenco en la mondo. La ĉefaj eraroj estas videndaj en la fatala subtaksado de la altgradaj danĝereco kaj agresemo de Putin kaj Ruslando kaj en la tro mola okcidenta politiko de la trankviligo (t.n. appeasement-politiko de Bush ĝis Merkel) rilate al Putin, kiu senskrupule firmigis sian hejman perforto-potencon per ĉiam pli drastaj rimedoj kaj faroj por efektivigi la intencojn kaj planojn de la novaj potenculoj kaj samtempe aroge kulpigis la Okcidenton pri ĉiaj malbonoj kaj problemoj en Rusio kaj en la mondo por deflankigi de la propraj faroj kaj problemoj. Alia eraro estis, lige kun tiu trankviliga politiko, la naiveco de la Okcidento, ke milita danĝero en Oriento ne plu ekzistas. Ni tro longe bezonis por kompreni kia homo Putin vere estas, kaj fermis niajn okulojn antaŭ tiu ĉi problemo. La plej granda principa historia eraro estis, ke la Okcidento dum jardekoj amase aĉetis malmultekostajn varojn el altgrade krimaj ŝtatoj kiel Rusio kaj Ĉinio kaj per tio kontribuis al la rapida armado de tiuj ŝtatoj, por ke ili iam povu komenci militi kontraŭ la Okcidento por likvidi konkurencon kaj rivalojn. Sed tiu eraro verŝajne ne estis evitebla.

Dum la Okcidento volis vivi en paco kun Rusio kaj ne volis endanĝerigi la enspezigan komercon kaj demonstrative ignoris la militkrimojn aranĝitajn de la rusoj en Kaŭkazo (laŭ ordono de Jelcin kaj precipe Putin) dum la (altgrade krima) rusa milito en Ĉeĉenio, en Moskvo iu iama KGB-oficiro nomita Vladimir Putin, kiu ´estis lavita per ĉiuj akvoj´, komencis efektivigi la ruzon kaj cinikan planon, strebante kvazaŭ restarigi Sovetunion post la embarasa falo de la sovetia imperio laŭ la volo, peto, komisio aŭ taskigo de la iamaj KGB-funkciuloj por reakiri la monopolon pri la landaj resursoj kaj restaŭri similan diktaturon kiel en Sovetunio, sed sen komunismo.

Sekve Putin simple turnis la lancon, dum la Okcidento lasis lin trankvile kaj sukcese fari kaj permesis al li ion ajn, rigardante kiel li malkonstruas la demokration en Ruslando. La Okcidento kaj la ŝancoj, kiujn ĝi proponis, estis planece kaj krude ekspluatataj de Putin kaj de siaj amikoj, kiuj akaparis la resurojn de Ruslando kaj senlime riĉiĝis, dum la sama Okcidento estis senhonte trompita kaj kondukita en la kaptilon de Putin, en kiun ĝi finfine falis kaj nun provas pene eliri. Kiel siatempe la germanoj falis en la kaptilon de Hitlero kaj parto de la usonanoj en tiun de Trump. Tre simile.

Dum oni povas diri, ke EU kaj NATO ne vere faris gravajn erarojn, Rusio sub Putin, kies fanatika demagogia naciisma propagandaĉo malhelpas al la rusia popolo klare pensi, refalis ĉiujare pli kaj pli en la marĉon de la diktaturo, korupto, kontraŭleĝa kaj plumpe misuzata justico, politikaj kaj ekonomiaj krimoj kaj ĉiuflanka mizero. Kaj la homoj, al kies sorto Putin rilatas komplete indiferente, komencis denove malriĉiĝi – kaj elmigri. Jurij Levada estus profunde ŝokita, se li ankoraŭ vivus kaj devus konstati, ke la "sovetia homo" ne elmortis.

**Rusa mensoga propagando senfine kaj la ekzisto-rajto de Ukrainio**

Krom seninterrompa sovaĝa polemika propaganda batalo laŭ retorika stilo kaj kalibroj de Ĵirinovskij, Dugin, Solovjov, Kiseljov, Medvedev kaj aliaj, kiuj senkondiĉe reproduktas la rakontojn de la Kremlo aŭ de la ĉefdemagogo Putin mem, apenaŭ okazas objektiva, honesta kaj memkritika diskutado en la rusia ŝtata televido. Anstataŭe prosperas kruda kaj senĝena misprezentado, distordado kaj neado de la faktoj, same kiel sensencaj rusaj konspiraj teorioj. Temas pri la falsa kaj mensoga diskut-kulturo de la "rusa mondo" de Putin, kiu celas komplete inversigi kaj kontraŭi okcidentajn opiniojn, valorojn kaj analizojn. En tiu „imperio de la mensogoj" oni senhonte mensogas, tiel ke la traboj fleksiĝas. Oni publike starigas absurdajn kaj falsajn asertojn kaj disvastigas duonverojn por lavi la cerbon de la homoj, kaj oni palavras ĉirkaŭ la varmega kaĉo por deflankigi la popolon de la veraj problemoj. En principo temas pri la daŭrigo de la sovetia polemiko kontraŭ la Okcidento en iom reviziita formo, kiu ekzistas kaj servas esence nur por misfamigi la Okcidenton – kaj Ukrainion kompreneble. Se oni antaŭe riproĉis al la Okcidento kontraŭ-sovetiajn refleksojn, nun temas pri rusfobio. Same kiel la sovetia sistemo ankaŭ la "rusa mondo" kredas sin ĉiurilate supera, ne konfesas proprajn erarojn kaj sistemece kulpigas la Okcidenton pri la tuta mizero. Putin mem, la ĉefa kaŭzo de la rusa katastrofo, kiel objekto de la kritiko estas komplete tabuita, same kiel cetere ĉiuj aliaj ĉefaj estroj de lia reĝimo.

Kiel Ukrainio kadre de la Rusa Imperio kaj Sovetunio evoluigis siajn naciecon kaj ŝtatecon, celas montri la sekva konciza resumo de la ukraina historio ekde la 17a jarcento. La krima politiko de Ruslando kaj Sovetunio por konkeri kaj okupi aliajn landojn kaj perforte enmiksiĝi en ili havas longan tradicion kaj reiras, ekzemple en la kazo de Ukrainio, ĝis la 17a jarcento, kiam Ukrainio liberigis sin de la pola regado en popola ribelo de 1648 gvidata de la kozaka hetmano Bohdan Ĥmelnicki kaj kiam la kozakoj de Zaporoĵe fondis sendependan ŝtaton. En la Traktato de Perejaslav de 1654 la kozakoj tamen submetiĝis al la Moskva caro, kiu laŭ la plendo de la ukrainoj trompis ilin, ĉar li transformis Ukrainion al rusa kolonio, dum la rusa historiografio perceptas tiun traktaton kiel "reunuiĝon de Ukrainio kun Ruslando". Poste ankaŭ la Maldekstra Dnepra Bordlando de Ukrainio aldoniĝis kun Kievo al la rusa regno. La kozaka Hetmanejo dume ekzistis kiel aŭtonoma parto de la Rusa Imperio ĝis la regado de Katerino la Granda, kiu abolis ĝin. La "Ukraina Popola Respubliko" (kiu ampleksis ankaŭ Krimeon!), fondita post la Oktobra Revolucio en 1917 dum la rusa enlanda milito kaj ekzistinta ĝis 1920, estis la unua provo konsistigi Ukrainion kiel modernan sendependan ŝtaton. Sed en januaro/februaro 1918 Kievo falis en la manojn de la Ruĝa Armeo kaj en januaro 1919 estis proklamita la "Ukraina Soveta Socialisma Respubliko" (sen Krimeo!), kiu, kiel la Popola Respubliko, ampleksis Donbason, Ĥarkovon, Odeson ktp. Kiam Sovetunio estis starigita en 1922 Ukrainio estis unu el la fondaj membroj. Kiam la Unuiĝintaj Nacioj estis starigitaj ankaŭ la sovetaj respublikoj de Belorusio kaj Ukrainio iĝis membroj kun po unu voĉo en la Plenkunveno. Ĉi tiujn faktojn Putin prisilentas kaj anstataŭe argumentas, ke Ukrainio estas artefarita ŝtato, kiu estis kompilita laŭ plej diversaj eroj, kiuj antaŭe apartenis al aliaj ŝtatoj, inter alie iam Ruslando mem, dum la koncernaj "okcident-ukrainaj" terenoj de Pollando, Ĉeĥoslovakio/Hungario kaj Rumanio (kiuj en 1918-19 estis partoj de la "Okcidentukraina Popolrespubliko") estis aneksitaj de Stalina Sovetunio. En 1954 Nikita Ĥruŝĉov "donacis" Krimeon, kiu antaŭe estis parto de la RSFSR kaj iam apartenis al la krimeaj tataroj kaj otomanoj, al Ukrainio. Nur post la disfalo de Sovetunio en 1991 Ukrainio fariĝis denove suverena ŝtato en la nunaj limoj, kaj unuafoje kun internacia agnosko. Nuntempe Ruslando de Putin, kiu rakontas alian, sian propran historion de Ukrainio, en kiu li krude prisilentas diversajn gravajn historiajn faktojn, strebas perforte renkonkeri la ukrainajn teritoriojn, kiuj iam estis partoj de la Rusa Imperio. Sed la "paca reunuiĝo" de la jaro 2022 mizere fiaskis, ĉar Ukrainio ne plu volas esti parto de Ruslando.

Al la ruslanda popolo ŝajne mankas la sento kaj kompreno, ke Ukrainio – kaj ankaŭ Belorusio aŭ Moldavio – rajtas ekzisti sendepende de Rusio, eĉ se granda parto de rusoj opinias, ke Ukrainio (historie) apartenas al Ruslando. Des pli ke ne malmultaj rusoj kredas la rakonton de la Kremla propagando, ke Ukraino fariĝis marioneto de Usono kaj de la Okcidento. Aliflanke ŝajnas, ke multaj rusoj aŭ rilatas indiferente al ĉi tiu demando aŭ eĉ aprobas la postulon, ke Ukrainio – kiu laŭ Putin estas konstruaĵo de la komunistoj kaj nun regata de faŝistoj kaj naziistoj kaj nutrata per armiloj de NATO – estu detruita, likvidita kaj forviŝita de la mondmapo kiel memstara ŝtato, se ĝi sekvas la okcidentan vojon kaj antaŭ ol ĝi aliĝos al NATO. Internaciaj fakuloj pri rusa kaj ukraina historio sufiĉe atentigis pri la falsaj teorioj, kiujn Putin starigis kaj disvastigis por pravigi la konkeron kaj likvidon de la ukraina ŝtato. Kiel inteligenta homo Putin sendube scias ĉion tion, sed li bezonas propran historian teorion por pravigi kaj realigi siajn militplanojn. Al tiu viro simple mankas la (historia) honesteco favore al ekstrema falseco kaj perfideco en la sinteno rilate al la propra rusa popolo.

### La plimulto de rusianoj laŭdire daŭre subtenas la politikon de Putin aŭ eble rilatas indiferente al ĝi

Laŭ iam aktualaj – kaj intertempe eble eksaj – enketoj, la t.n. konservativ-patriotisma, naciisme infektita kaj propagandisme manipulata plimulto de la rusia loĝantaro evidente daŭre subtenas la Kremlan politikon, kiu inkluzivas la barbaran rusian militon kontraŭ Ukrainio. Esence temas pri la tiel nomata "Putin-plimulto", kiu daŭre elektas la eternan prezidenton al la pinto de la ŝtato kaj certigas, ke li restos tie. Tiu "Putin-plimulto" kaj iomete pli verŝajne rilatas al la fakto, ke granda proporcio de rusianoj aliĝis al la teorio de Putin, ke ukrainoj formas unusolan nacion kun la rusoj kaj ke Ukrainio historie apartenas al Rusio kaj ne povas esti aparta ŝtato. La samo validas por Belorusio kaj aliaj landoj en la regiono. La rezultoj de tiuj enketoj, kiuj provas sondi la opiniojn de la homoj, tamen, ĉiam dependas de la maniero kiel la demandoj estas formulitaj, kiu faras la enketojn kaj ĉu ekzistas premo sur la respondantojn. Multaj el ili timas kaj rifuzas sincere esprimi sian veran opinion. Dum la rusa voĉdona instituto VCIOM, kiu estas proksima al la Kremlo, disvastigas en la mondo la legendon pri pli malpli 80%-a subteno al la Putina (milit)politiko kontraŭ Ukrainio, la sendependa "Levada"-centro en Moskvo rivelas tute malsamajn ciferojn kaj konsideras la ĉi-rilatan subtenon de la rusia loĝantaro signife pli malalta, nome malpli ol 50%.[2] Efektive la konfido de la rusianoj al la reĝimo de Putin laŭdire estis frakasita en la lastaj jaroj, precipe en 2011-12, ĉar okazis tro da aferoj, kiuj kolerigis la popolon. Alia kontraŭdiro estas jena: Se, laŭ kelkaj kritikistoj, la rusianoj laciĝis pri la reĝimo de Putin kaj ĝia politiko de milito kaj subpremado, kial ili do ne publike esprimas sin kontraŭ tiu reĝimo ? Nu, la respondon oni konas. Vastaj kuraĝaj kaj heroaj protestoj okazis en la pasintaj jaroj, precipe en 2011-12 kaj en 2017-19, sed kiel oni vidis ili estis kruele disbatitaj de la Putina reĝimo, tiel ke praktike neniu plu kuraĝas publike esprimi sian opinion, des pli ke protestemulojn atendas drastaj punoj.

Garri Kasparov skribis sur p. 331f.: „La periodo, en kiu li (t.e. Putin) provis certigi la popolan subtenon okazigante falsajn balotojn, estis finita. Malgraŭ registara propagando la plej multaj rusoj sciis, ke la sistemo estis kruela farso, sed tiu (kon)scio ne sufiĉis por persvadi milionojn por endanĝerigi iliajn sekurecon kaj liberecon kaj kontraŭstari bone armitan polican terorŝtaton.“

Ruslando estas drasta ekzemplo por ilustri kiel per kruda teknika kaj propagandisma manipulado kreita plimulto subtenanta la regantan partion, kies aŭtokratiismaj estroj uzurpis la potencon, cetere ĉio laŭ formalaj demokratiaj proceduroj, estas misuzata por helpi al la ŝtataj regestroj efektivigi iliajn dubindajn celojn kaj intencojn, por poste sole fari ĉiujn gra-vajn politikajn decidojn, utiligante ilin en la nomo de la supozata plimulto, ekzemple por persekuti kritikis-

---

[2] La evoluon de la procentaĵo vd. sub https://www.levada.ru.

tojn kaj opoziciulojn kaj lanĉi militon kontraŭ najbaraj landoj. Certe ankaŭ aliaj landoj agis kaj agas laŭ simila modelo, sed nuntempa Rusio, kiu tamen portas grandan respondecon kiel monda nuklea potenco, estas speciala kazo, kiu estas serioze konsiderenda. Tiuj cirkonstancoj faras, ke Rusio, kiu troviĝas komplete ekster popol-demokratia kontrolo, restas ekstreme danĝera terorŝtato, pri kio la civitanoj de multaj aliaj landoj, kiuj neniam vivis sub rusa regado, nur malfacile aŭ tute ne povas imagi.

Cetere ankaŭ la ukraina prezidento Volodimir Zelenski, vera heroo de nia tempo, ĝuas altan gradon de aprobo kun ĉirkaŭ 80%, sed kontraste al Putin, tio verŝajne estas pli realisma cifero, ĉar la opini-esprimado de la ukrainoj ŝajnas pli aŭtenta kaj pli honesta ol en Rusio, kie la homoj kutimas praktiki oportunisman pozicion.

### Malsamaj opinioj malgraŭ kvazaŭa unuanimeco

La opini-situacio en Rusio tamen estas multe pli komplika kaj diferencinde rigardenda ol ĝi estas transdonita en la (rusia aŭ okcidenta) gazetaro. En Ruslando verŝajne ekzistas ĉiuj eblaj facetoj en la ekzistantaj politikaj spektroj, de radikal-dekstraj ĝis radikale maldekstraj. Eĉ en la politika elito oni trovas t.n. dekstrulojn, maldekstrulojn, liberalulojn, konservativulojn ktp., kies ideoj en principo respeguliĝas en la – oficialaj kaj neoficialaj – rusiaj politikaj partioj. Ĉar nuntempe la tuta (ekstera) politiko en Ruslando estas superregata ekskluzive de la kvazaŭ-devigaj ideoj kaj dogmoj de la t.n. "Putin-plimulto", kiuj en principo funkcias kvazaŭa kiel postsovetia anstataŭaĵo de la iama komunisma ideologio, la aktiva, libera kaj malferma sinesprimiĝo de ĉiuj aliaj politikaj ideoj estas subpremata kaj malhelpata. Tio montriĝas i.a. en tio, ke la Kreml-proksima partio "Unueca Ruslando“, ankaŭ nomata "partio de la potenco", klopodas per ĉiuj rimedoj eviti, ke en la komunumoj, urboj kaj provincoj (subjektoj) reprezentantoj de aliaj partioj gajnu balotojn.

Do ne estas tiel, ke en Rusio ne ekzistus (politika) plureco de opinioj. Eĉ ekzistas sufiĉe multaj kritikistoj kaj opoziciuloj, plejparte kuriozaj intelektaj solemuloj aŭ gvidantoj de marĝenaj grupetoj sen decida influo al la popolamasoj en la grandega lando. Ankaŭ pri demokratio ekzistas diversaj sintenoj.[3] Krom tio en la lastaj jaroj preskaŭ ĉiuj kritikistoj kaj opoziciuloj, kiuj ne plaĉis al Putin, estis ekskluditaj, forpelitaj, arestitaj aŭ mortigitaj. Multaj membroj de la opozicio forlasis la landon. Ĉirkaŭ 200 membroj de la opozicio atendas kondamnon.

En neliber(ec)a, ŝtate subpremata, nedemokrateca politika kulturo kaj en duonmoderna kaj nereformita socio kiel la rusia, kiu sentas sin malplivalorigita, humiligita, ŝtate kuratorigita kaj maljuste traktita, kiu emas al malraciismo, fatalismo, anarkiismo, nihilismo kaj tabuismo kaj en kiu la unuopa homo montras ekstremajn individuismon, egoismon kaj oportunismon (por defendi sin mem), ĉiu civitanIno tamen konservis sian tute privatan opinion, kiun li aŭ ŝi ofte ne esprimas malkaŝe (pro timo kaj sinprotekto), precipe rilate al fremduloj. Al la ekstera mondo la rusianoj ofte aperas kiel homogena amaso. La psikologia konstitucio de rusoj kaj rusianoj estas komplika. La malfacilaj kaj diversaj historiaj spertoj mense konfuzis ĉi tiun popolon, kaj la sovetia tempo, en kiu la rusoj devis adori ĉion sovetian kaj abomeni ĉion ceteran, komplete difektis kaj fuŝis ĝin (poste sekvis la sovaĝaj 90aj jaroj kaj Putin por fari ĉion ankoraŭ pli terure ...). Tamen ne ekzistas dubo, ke la plimulto de rusianoj konas la veron ekzemple pri la demando kiu atakis kiun en tiu krima milito.

Sed la rusoj neniel estas senkritikaj spiritoj. Enketoj montris, ke rusoj estas same ofte ĉagrenitaj pri sia registaro kiel civitanoj de multaj aliaj landoj kiam temas pri ĉiutagaj zorgoj. Estas konate, ke la rusoj malamas kaj malakceptas siajn politikistojn, dum alie ili respekte akceptas kaj aprobas la decidojn de la Kremlo, sendepende de tio kiu aktuale regas tie. Koncerne la

---

[3] Vd. ekz. https://www.bpb.de/themen/europa/russland-analysen/nr-243/144898/analyse-die-entwicklung-des-russischen-demokratieverstaendnisses-2008-2012-gab-es-einen-demokratischen-aufbruch. (gemanlingva).

respekton de politikistoj ekzistas grandega diferenco inter duonsanktulo kiel Vladimir Putin kaj Dmitrij Medvedev, kiu estis simple primokata de la rusianoj – kvankam, cetere, en Okcidento li reprezentis pli bonan alternativon al Putin.

Kiel la estro de la "Levada"-centro en Moskvo, Denis Volkov, atentigis, oni devas distingi inter entuziasmo por la milito kaj subteno al Putin en Rusio. Nuntempe okazas nek simbola publika subteno nek stratprotestoj en Rusio, ĉar ajna publike esprimita opinio estas tuj brutale subpremata de la Putin-reĝimo. Eĉ manifestacioj *apoge* al la "speciala milita operaco" ne okazas, kaj primilita entuziasmo ne estas videbla nek sentebla. La tuta lando silentas en tiu aŭ alia direkto, nur en la amaskomunikiloj la laŭta agresema hurlado de diversaj demagogiaj ŝtataj propagandistoj estas daŭrigata. Nenio eksterordinara povas esti observata en Moskvo kaj en aliaj rusiaj grandurboj (eble krom fermitaj okcidentaj butikoj), la vivo pluevoluas kiel kutime. Multaj preterpasantoj opinias, ke la registaro faros la ĝustajn kaj necesajn decidojn kaj trovos la korektajn solvojn. Kun ĉi tiu sinteno la rusianoj fordonis la politikan respondecon tute al la registaro kun la sento, ke ili ĉiukaze ne povus ŝanĝi ion ajn en la nuna situacio. Tamen tio ne ŝanĝas la fakton, ke ses monatojn post la komenco de la tiel nomata "speciala milita operaco" kontraŭ Ukrainio la plimulto de rusianoj ankoraŭ ŝajnas suteni la politikon de Putin pri la ukraina problemo. Oni ree parolas pri pli ol 80% de la homoj. La ciferoj en la enketoj do estas pli malpli la samaj kiel post la komenco de la nova milito en februaro, kiam la populareco de Putin eksplodis, post kiam ĝi falis antaŭe. Samtempe la malakcepto de Usono estas preskaŭ same altgrada kiel komence de 2015. Precipe pli maljunaj generacioj ripetas la stereotipajn pravigojn de la Kremlo, kiuj estas klasifikitaj kiel mensogoj en Okcidento, dum aliaj partoj de la socio ŝajnigas sin senpovaj, kaj ceteraj opinias, ke tiu ĉi milito certe iam finiĝos. La atento kaj intereso pri la milito kaj la situacio en Ukrainio pli kaj pli malkreskas. La homoj evidente alkutimiĝis al la kriza situacio. Antaŭ la kameraoj de eksterlandaj ĵurnalistoj rusoj aŭ rusianoj kutime hezitas komenti la militon de Putin. Kelkaj el ili konfesis, ke ili atendis, ke la armea operaco en la Donbaso okazos pli rapide, sed ili komprenis, ke ekzistas forta kontraŭstaro de Ukrainio kaj ĝiaj okcidentaj subtenantoj. Aliaj volas pacon kun la mondo kaj kun Ukrainio, sed agnoskas, ke tio nuntempe ne eblas. Ia sento de kulpo ne povis esti observita. Oni preferas forpuŝi la temon. Multaj rusoj prepariĝas al pli longa milita periodo kaj la "nova realeco". La milito okazas ĉefe en la televido, kie ĝi alprenis la formon de hibrida milito, kiu estas subtenta de la informa kaj diskuta propagan-do kaj de regulaj alporoloj kaj mesaĝoj de Putin (neniu alia), en kiu li disvastigas siajn vid-punktojn, kiuj ne povas esti kontestataj aŭ kritikataj, kun fatalaj sekvoj por la publika diskut-kulturo en la lando. La cititaj opiniesprimoj eble estas kelkaj reprezentaj ekzemploj, sed kiel grandparto de la rusia socio vere pensas kaj sentas pri la brutala milito kontraŭ Ukrainio estas neklare. La sinteno al la Putin-reĝimo estas ankaŭ demando de generacioj: Dum la pli maljunaj homoj grandparte apogas Putin, la junaj pli ofte kritikas aŭ rifuzas lin. Ŝajne ekzistas ia logiko inter la indiferenteco de la rusianoj pri ĉi tiu milito kaj la politika abstinado, al kiu ili estis edukitaj kaj devigitaj de la Putina reĝimo dum la pasintaj 20 jaroj en la senco de la pasiveco kaj sinde-teno pri politiko. Kial do ili nun subite devus aktive okupiĝi pri politiko kaj la ukrainia milito, kiu ne rekte koncernas ilin, kiel ili kredas! La Kremlo klopodas ŝajnigi ian normalecon al la publiko – dum la subpremo daŭras plenforte.

Kiam Anna Politkovskaja siatempe parolis kaj skribis pri tio, avertante la rusojn, ke Putin kaj liaj sekretaj servoj intencas forigi la rusan civilsocion kaj revenigi sovetiecan diktaturon, ŝi trovis nur indiferentecon en la vicoj de ordinaraj rusoj, kiu estis por ŝi neeltenebla. Tio estis tiel dum la brutalega ĉeĉena milito en 2000 kaj tio estis denove la kazo post la komenco de la rusa agresmilito en 2022 kontraŭ Ukrainio. (Sweeney, la Murdisto en la Kremlo, p. 122f.)

Alia baza problemo estas, ke grandparto de la rusia publiko estas fortranĉita de eksterlandaj, ĉefe okcidentaj amaskomunikilaj raportoj kaj informoj, kiuj povus doni al la rusaj konsumantoj malsaman perspektivon pri la aktualaj temoj, kiuj en la propra lando mem estas tiel eks-

treme unuflankece traktataj. Ĉar diversaj okcidentaj sociaj retoj iĝis neatingeblaj aŭ interrompitaj en Rusio, tiu izolado de la inform-uzantoj ankoraŭ pli multe faciligas al demagogiaj popolistoj kiel la cinika Putin-bando influi kaj manipuli la propran popolon, kiu estas praktike mal-helpata informiĝi pri la reala situacio en la lando kaj la mondo.

### Nova ondo de „orkestrita“ malamo de Rusio kontraŭ la Okcidento

Bedaŭrinde, hodiaŭ ni alfrontas novan ondon de terura – kaj tute senbaza – malamo de Ruslando kontraŭ la Okcidento, kiu estas instigita unuflanke de la Kremlo (fakte Putin persone) kaj aliflanke de parto de rusoj aŭ rusianoj mem, kiuj portas kaj vivas tiun malamon pere de sia apogo al Putin, kaj verŝajne ekde la sovetiaj tempoj.

Nature en ĉiuj landoj la homoj troviĝas sub specifa politika propaganda influo de la propra ŝtato. Rusio prezentas tamen specialan kazon, ĉar en la pasintaj 20 jaroj la putinistoj klopodis kaj fakte grandparte sukcesis inversigi la tutan "okcidentan propagandon", kiu trafis la rusojn kaj rusianojn jam dum la malfrua komunisma tempo (sub Gorbaĉov) kaj precipe dum la 1990aj jaroj, kiam Ruslando efektive provis enkonduki okcidentajn "valorojn" (kiel demokration kaj merkatekonomion). Ĉar la instalado de tiuj okcidentaj valoroj evidente fiaskis en Rusio (certe Putin persone multe helpis, por ke ili fiasku) kaj okazis kelkaj aliaj malbonŝancoj de la historio, kiuj ne plaĉis al Putin mem, la rusoj nun strebas venĝi sin pro tiu fiasko, pri kiu ili kulpigas sole la Okcidenton mem, dum ĉe si mem ili povas vidi neniujn erarojn aŭ kulpon.

En la rusiaj ŝtataj amaskomunikiloj, precipe en certaj politikaj programoj de la televido kontrolata de la Kremlo, oni ĉiutage povas observi kiel atestanto la agreseman retorikon de ties moderatoroj kaj debatuloj, kiel obseditaj ili estas pri la ´malbonega Okcidento´, precipe Usono, kiun ili obstine kulpigas pri la mizero en la mondo kaj precipe en Ruslando, dum ´sankta´ Rusio konsistas sole el anĝeloj strebantaj al internacia justeco. La tuta aĉega polemiko kontraŭ la Okcidento, kiel ĝi estas celebrata de jaroj ĉiutage en ĉiuj kanaloj kaj kampoj fare de la cinikaj demagogiaj rusiaj propagandistoj, estas senprecedenca en la lastatempa historio kaj apenaŭ superebla. Ĉi tio estas, kompreneble, unuflanke pura konspira kaj kalumnia propagando por pravigi sin mem, kaj aliflanke pura hipokriteco. Precipe politikistoj de la partio (fakte movado) "Unueca Rusio", kies membraro ŝajnas konsisti grandparte el oportunistoj, konformistoj, karieristoj, profituloj kaj hipokrituloj laŭ la konata modelo de KPSU, subtenas la politikon de Putin en Ruslando. Eĉ aliaj "ensistemaj" Dumao-partioj, ekzemple la komunistoj, kiuj ludas la rolon de la (pseŭda) opozicio kaj intertempe estas politike pli malpli egalŝaltitaj, ĝenerale senkondiĉe apogas la politikon de la Kremlo, precipe la eksteran. Neniu el ili kritikas la Putinan reĝimon, sed prefere subtenas ĝin per sia oportunisma, hipokrita aŭ konvinkita sinteno. Kritiko kontraŭ Putin kaj de la putinisma sistemo verŝajne signifus la tujan finon de la kariero de la koncerna politikisto. Eĉ la sovetiaj deputitoj kondutis pli dece kaj pli digne rilate al eksterlando kaj la Okcidento kompare kun la parlamentanoj de la Putin-Dumao.

### Ruslando ekzercas la ribelon kontraŭ la Okcidento

Eble oni povas havi komprenon por popoloj, kiuj ribelas kontraŭ la Okcidento, pri kiu ili opinias, ke ĝi trudis al ili siajn regulojn kaj valorojn, sen ke ili petis tion aŭ profitas de la okcidentaj bonfartaj promesoj. En simila situacio eble parte troviĝas Ruslando. Oni do ne devas miri, se en kelkaj tiaj landoj regas forta kontraŭ-okcidenta eto-so, kvankam la tieaj popoloj daŭre celas imiti la okcidentajn progresojn precipe materiajn. Kompreneble "la Okcidento" povas kaj devas esti kritikata. Ĝiaj aroganteco de la supereco kaj malemo serioze okupiĝi pri la krimoj de la koloniismo indignigis kaj malesperigis multajn samtempanojn precipe en la koncernitaj landoj. Do ni vivas en epoko, en kiu la iamaj koloniigitaj, subpremitaj kaj ekspluatitaj landoj revenĝas sin kontraŭ la okcidentaj koloniismo, imperiismo, diktado kaj eks-

pluatado. Tiuj landoj, kiuj sentas sin sufiĉe fortaj kaj influaj, nepre kaj senskrupule praktikas tiun venĝon, de Ĉinio ĝis Saŭdarabio kaj Sudafriko.

Sed Putin ne estas la unua, kiu ribelas el la rusia angulo kontraŭ la Okcidento – la sovetianoj praktikis tion dum 70 jaroj kaj mizere fiaskis. Estas signife kaj verŝajne ne maltipe por Rusio, ke ĝuste iama KGB-agento gvidas ĉi tiun kontraŭ-okcidentan ribelon aŭ revolucion, kiu eĉ pretas malrespekti la Ĉarton de UN kaj universalajn homajn rajtojn, kuirante propran supon, kaj renversi la nunan mondordon kun la aserto, ke temas pri konceptoj truditaj de la Okcidento. Nun Putin, la gvidanto de la "kontraŭ-okcidenta movado", ja mem kondukas kvazaŭ koloniisman militon en Ukrainio (kaj pli frue en Kaŭkazo), kiam li celas rekonkeri teritoriojn, kiuj iam apartenis al la Ruslanda Imperio aŭ Sovetunio. Eĉ se la Okcidento faris gravajn krimojn en siaj iamaj kolonioj kaj eĉ plurfoje aranĝis terurajn militirojn kontraŭ Ruslando (Napoleono, Hitlero), tio ne estas kialo, por ke la rusoj nun povu ripeti la samajn tragediojn kaj krimojn en sia supozate propra influsfero.

La akuzo de Rusio pri koloniismo kontraŭ la Okcidento estas kompreneble nur plumpa provo kaj preteksto por deflankigi de la koloniisma pasinteco de la propra imperio. Okcidento ne plu subtenas koloniajn regnojn, eĉ se ĝi ankoraŭ ne tute venkis aŭ digestis sian koloniisman pasintecon. Kiel sub la bolŝevismo, stalinismo kaj komunismo Rusio rifuzas kritike trakti ankaŭ la propran koloniisman kaj imperiisman historian pasintecon, per kiu ĝi kulpigas aliajn. La malo estas la kazo: Rusio daŭre strebadas perforte kunteni sian kolonian imperion kaj konservi sian kolonian heredaĵon, ĉar Moskvo timas nenion pli ol la disfalon de tiu ĉi (kohera) kolonia imperio, kiu konsistigas la nacian teritorion de Ruslando kaj konsistigis la teritorion de USSR. Kaj alia zorgo de la Putinistoj nature konsistas en tio, ke ili timas demokratiigon de Ruslando laŭ la modelo la "koloraj revolucioj", kiuj forbalaas aŭtokratiismajn sistemojn. Ĉi tiu timo estas por Putin kaj lia reganta ĉirkaŭaĵo multe pli reala kaj grava ol la laŭdira ĉirkaŭado de Ruslando fare de NATO, pri kiu Putin konstante palavras.

Sed kion hodiaŭ Rusio kaj aliaj friponaj, terorismaj kaj krimaj ŝtatoj de (Eŭr)Azio praktikas aŭ intencas, estas gvidi specon de malfruiĝinta kulturbatalo kontraŭ la Okcidento, dum en la kazo de Rusio la persona venĝo de Putin kaj lia KGB-pensmaniero heredita de profundaj sinistraj sovetiaj tempoj, kiujn li nek venkis nek digestis, kaj la rusa naciismo ludas gravan rolon. Iuj historiistoj atentigis ankaŭ pri la cirkonstanco, ke Ruslando kompareble troviĝas psikologie iusence kiel Germanio en la intermilita kaj precipe en la hitlerisma tempo, kiam ĝi sentis sin trompita kaj humiligita de la Versajla traktato kaj celis revenĝi sin.

HODIAŬ nek usonanoj nek germanoj nek aliaj eŭropanoj kulpas pri la nuna rusa tragedio. Tiuj ĉi kaj multaj aliaj popoloj estis erare kaj tute maljuste klasifikitaj de Moskvo kiel "malamikaj ŝtatoj", ĉar ili prave trudis sankciojn al Rusio kiel punon pro la kontraŭ-ukrainia milito, kiun ili klopodas haltigi. Eĉ se NATO danĝere alproksimiĝis al la landlimoj de Rusio per akcepto de tieaj landoj aŭ liveris armilojn al Ukrainio, por ke ĝi povu defendi sin kontraŭ agresema najbaro, kio eble signifis provokon por Moskvo, ne ekzistas kredinda kialo por militataki pacajn najbarajn popolojn por efektivigi ilian neniigon, nur ĉar ili rifuzas fariĝi satelito de Ruslando kaj kontraŭstaras la rekonkerajn ambiciojn de Moskvo. En la 21a jarcento ankaŭ pli malgrandaj popoloj havas la netuŝeblan rajton al (ŝtata) sendependeco, inkluzive de ukrainoj kaj belorusoj, sen paroli pri ceteraj popoloj de la iama Ruslanda Imperio kaj Sovetunio, kiuj ne estas slavoj. Malgraŭ ŝajna komuna origino, rusoj, belarusoj kaj ukrainoj historie diverĝe evoluis unu de la aliaj kaj fariĝis memstaraj etnoj kaj nacioj ene de siaj ŝtatlimoj, ĉu al la Kremlo tio plaĉas aŭ ne, oni devas akcepti tiun fakton. Krom tio la ukrainoj decidis aliĝi al la Okcidento, kaj ankaŭ tiun volon la rusoj devas respekti. Ŝajnas, ke ili ankoraŭ devas lerni ĉi tiujn lecionojn, kvankam ili daŭre obstine neas tiujn faktojn.

**Demokratio en Rusio mizere fiaskis**

Jam delonge Rusio ree estas politike regata per kruda perforto kaj eterna mensogado, pura ciniko kaj senhonta malestimo al la homa digno, abomeno al la demokratio kaj laŭjura ŝtateco. Tial Ruslando estas ne nur nomata „imperio de la malbono“, sed tute prave ankaŭ „imperio de la mensogoj“. La demokratia kaj libereca ordo, kiu devus regi ĉi tiun landon, estas ege fragila kaj ŝajnas malhavi daŭran ŝancon, ĉar ĝi tragike malsukcesas mizere ĉiam denove. La problemo estas, ke evidente en tiu lando ne ekzistas tradicio de reala demokratio kaj ĝiaj regantoj ne estas interesataj havi la okcidenttipan demokration, ĉar ĝi nur ĝenas ilian regadon kaj ili timas perdi la eternan povon.

Sed en Rusio ekzistas alia logiko kaj ĉio estas iom komplika kaj inversa. Plimulto de rusoj aŭ rusianoj ŝajnas malakcepti okcidenttipan demokration kaj liberecon kaj anstataŭe sopiras al la tipe rusa "fera povo", "forta ŝtato", kiu promesas krei ordon en la lando. Tiel rakontas la legendo. Oni malalte taksas molajn, kompromisemajn gvidantojn (kiel Gorbaĉov, Jelcin aŭ Medvedev), ĉar ili nur endanĝerigas kaj kompromitas la statuson de la imperio. Laŭ enketoj, kruelaj potenculoj kiel Ivano la Terura aŭ Stalin troviĝas sur la unuaj rangoj de la listo de plej popularaj rusaj gvidantoj, dum reformistoj kiel Aleksandro IIa, Gorbaĉov, Jelcin, Gajdar aŭ Ĉubajs aŭ kiel ajn ili nomiĝas estas rifuzitaj. Por iuj rusoj aŭ rusianoj (plimulto?) la reĝimo de Putin estas justa, forta kaj bona, por aliaj (minoritato?) ne. Tamen estus malĝuste aserti aŭ kredi, ke ĉiuj rusoj apriorie kaj senescepte malakceptas aŭ ĝenerale rifuzas okcidentajn valorojn, kiuj ankaŭ komprenas sin kiel universalajn valorojn. Dum jardekoj da putinisma propagando ĉi tiuj valoroj kaj idealoj estis trafitaj de fortaj kritiko kaj premo. Sed kia alternativo de valoroj por Ruslando ekzistas? Eternaj politika subpremado, mallibereco, aŭtokrateco, diktaturo, ortodoksa kuratoreco kaj civilsocia ultrakonservativeco! Kaj ĉu Rusio orientiĝu laŭ la Okcidento aŭ laŭ Azio? La rusa kompreno pri demokratio kaj politiko estas ĉiuokaze malfacile komprenebla en Okcidento.

Sen voli idealigi ĉi tiun atingon: Dum en la “civilizita demokratia Okcidento” elkristaliĝis “pozitiva” kompreno de la juro sub la kondiĉoj de la klerismo, humanismo kaj la ideo de la homaj rajtoj (eksklude la koloniisman, servutan, imperiisman kaj nazian epokojn), tia kompreno ne povis disvolviĝi sub la brutalaj kaj barbaraj kondiĉoj de la cara kaj sovetia sistemoj. Oni eĉ intence batalis kontraŭ ĝi, ĉar ĉio, kio ekzistis en Okcidento, estis malakceptita de tiuj friponaj reĝimoj. Rusio do esence restis krima kaj senleĝisma civilizo, fakte senjura aŭ maljureca ŝtato regata de krimuloj, ŝtelistoj kaj murdistoj – caristoj, komunistoj, kaj poste de la tre krima kaj fripona reĝimo, kiu establiĝis sub Putin. En tiuj altgrade reakciaj, kontraŭmodernaj kaj malhomecaj sistemoj de ĝenerala kaj daŭra subpremado, la individuo ricevis neniun ŝancon efektivigi siajn rajtojn, krom submetiĝi kaj obei al aŭtoritatisma, diktatura aŭ “totalisma” perforto-ŝtato gvidata de senskrupulaj, mafiecaj kaj ekstreme koruptaj bandaj krimuloj de la plej terura speco, kiuj primensogas kaj trompas la proprajn civitanojn kaj la mondan homaron en ĉiu okazo. Ruslando restis eterna klasika gangsterŝtato, ĉar ĝi estis apenaŭ kaptita kaj (nur supraĵe) influita de la pozitivaj fluoj, kiuj ekzistis en la mondo. Tial la maljureca ŝtato en Rusio povis prosperi ĉiam denove.

Oni ja povas kaj devus respekti certajn tradiciojn de iuj landoj. La rusa popolo eĉ konsentas rezigni pri la politika statuso kiel "suvereno", kiu ĝi neniam devis esti (ĉar la suvereno ĉiam estas la dirita regnestro en la Kremlo). Al ĝi do restas neniu alia tasko ol subteni kaj elekti la proponitajn "ĝustajn" kandidatojn en (manipulitaj kaj falsitaj) balotoj kaj obei la ordonojn de la vertikala potenco. Rusio estas perfekta ekzemplo por montri kiel tuta grandega popolo estas senrajta amaso, kiu povas esti politike mistraktata kaj misuzata (ankaŭ) por malbonaj celoj de sia registaro, kun fatalaj sekvoj: La rusoj kaj rusianoj ŝajne enkalkulas kaj ne timas rigoran internan subpremadon kaj reprezaliojn, ĉar tion ili kutimas elteni jam dum jarcentoj.

Tiel hodiaŭ Rusio estas denove sub la plena centra kontrolo de la Kremlo kaj ĝiaj sindonemaj organoj de la sekretaj servoj same kiel la ĉio-ampleksaj policaj, justicaj kaj sekurecaj strukturoj de la terorisma ŝtato kun "patrono" Putin kiel plej supera juĝisto en la "rusa mondo", kiu arbitre decidas ĉiujn gravajn aferojn laŭ persona bontrovo, inkluzive tiujn de milito kaj paco. Ekde la komenco de sia regado kaj helpe de sia "silovikista" kolegaro Putin iom post iom sistemece forigis aŭ likvidis la opozicion: De la potenco de la guberniestroj en la provincoj, de la ekono-miaj oligarkoj, ĉeĉenaj separistoj, malamikoj kaj "perfiduloj" en la interna sistemo, la politika opozicio, sendependaj agantoj de la civilsocio ĝis la kritikaj ĵurnalistoj kaj finfine la malkon-tenta kaj protestema popolo mem, kiu estis prenita kvazaŭ kiel kolektiva ostaĝo. Tiel la demo-kratio estis detruita pli kaj pli ĝis kiam restis nur fasado aŭ ŝajno de ĝi. La Ŝtata Dumao jam delonge perdis siajn funkcion kaj rolon de sendependa parlamento, ĉar kiel ĉio cetera en la egalŝaltita Putin-ŝtato ankaŭ ĝi servas sole kiel plumpa plenumorgano de la volo de la Krem-lo. Unu el la malmultaj formoj de civila malobeo, kontraŭstaro kaj protesto flanke de la popolo restis la instrumento de la malalta balotpartopreno, kiun la regantoj plej multe timas kaj provas manipuli kaj falsi (kio respeguliĝas en kelkaj lokoj kiel Ĉeĉenio en absurda formo de 98- kaj 99%-aj partoprenokvotoj).

Post la brutala armea atako de Putin kontraŭ Ukrainio en februaro 2022 ankaŭ la ruslandanoj estis silentigitaj. Multaj rusoj kaj rusianoj simple ripetas laŭvorte la propagandon de la Kremlo, ĉu pro konvinko, oportunismo aŭ sinprotekto ne estas klare. Tiuj, kiuj ne volis resti en Rusio, forlasis ĝin en ĉiuj direktoj. Oni demandas sin kial la landlimoj de Rusio ankoraŭ ne estis fermitaj kaj kiam tio eble povus okazi. Multaj aliaj rusoj kaj rusianoj estis senditaj per tankoj kaj pafmaterialoj al la najbara "frata" lando por batali kontraŭ laŭdiraj ukrainaj "faŝistoj kaj naziistoj", kiuj tie ne povis esti trovitaj, perdante la vivon amase, ĉar la ukraina armeo neatendite kapablis, per la helpo de aliaj nacioj, efike defendi sin kontraŭ la sovaĝaj militemaj hordoj el Ruslando.

En la cirkonstancoj de la brutala rusia milito kontraŭ Ukrainio la ruslanda popolo ŝajnas esti retiriĝinta en fazon de silentado, timo, indiferenteco, rezignado kaj atendado, kvankam la rusoj certe atentas kio okazas. Kiomgrade ĉi tiu sinteno povus transformiĝi de pasiva amasrezisto al aktiva agado kontraŭ la potenco kiel en 2011-12 kaj 2017-20 ankoraŭ ne estas antaŭvideble. La senkompataj reprezalioj de la Putin-reĝimo certe malhelpas ajnan publikan agadon. Surstrataj amasprotestoj kiel tiuj, kiuj okazis en Rusio en tiuj jaroj, dume do ne plu estas imageblaj, ĉar la subpremaj organoj senprokraste brutale sufokas ilin en siaj ĝermoj, kaj la drastigitaj leĝoj de la Putin-reĝimo malhelpas kuraĝajn elpaŝojn de la civitanoj. Neniu nur iomete racia homo do deziras kaj kuraĝas manifesti kaj protesti surstrate en Rusio kontraŭ la Putin-reĝimo, ĉar oni certe estos arestita kaj longe traktata de la justico.

**Rusio kiel "klasika" gangstera, mafia kaj fripona ŝtato - Putinisma Rusio kiel maljusta terorisma raboŝtato kaj "imperio de la malbono" 2.0.**

Diversaj aŭtoroj estas konvinkitaj, ke Ruslando apartenas al la "klasikaj" gangsteraj, mafiaj ŝtatoj kun longa tradicio de fripona kaj krimula civilizo. La temaro de la gangsterreto, gangsterismo kaj gangsterŝtato en Ruslando estis meritplene esplorita fare de Mark Galeotti en ties impona verko pri la "laŭleĝaj ŝtelistoj" (malfacile tradukebla nocio de la rusa "vory v zakone“. Vd. The Vory: Russia's Super Mafia. Yale University Press 2018). La kleptokratio de la Putin-reĝimo, kiu kunfandis la gangstertradiciojn de la lando, ŝajnas daŭrigi tiujn "kulturajn" tradiciojn. La diversfacete prilaborita historia rakonto de Galeotti pruvas kaj plifortigas la identigon kaj difinon de Rusio – almenaŭ parto de ĝi – kiel "klasika" gangstera, mafiisma kaj fripona raboŝtato, kiel unika klasika krimcivilizo en si mem, granda kaj malgranda, kiel ĝi ekzistas dum jarcentoj ĝis la plej altaj niveloj de la ŝtatpotenco. Tiu ĉi krima civilizo inkluzivas kaj la esence aŭtokratecan politikan stilon de la rusaj caroj kaj la altgrade krimajn prak-

tikojn de la "maljureca" sovetia sistemo kun ĝiaj fifamaj sekretservaj strukturoj (kiuj ekzistis jam antaŭe). La bolŝevisma komunismo, kiu estis direktita kontraŭ okcidentaj (kaj universalaj) valoroj, malgraŭ palavro pri justeco kaj egaleco, kiu devis deflankigi de la realeco, eĉ intensigis la ĝeneralan sakrilegion per siaj malmoralaj kaj kontraŭleĝaj agoj interne kaj ekstere, nutrante kaj fortigante la "ŝtaton en la ŝtato" (deep state) aŭ "mafian ŝtaton" (Luke Harding). En la nomo de la blindiga kaj erariga marksisma-leninisma ideologio, kiu estis, kiel konate, nenio alia ol mantelo por kaŝi la grandrusan ŝovinismon kaj imperiismon (de la antaŭaj caroj) kaj ties krimojn, estis permesita ĉio kion ´dio malpermesis´. En tiu reakcia spirito pluraj generacioj de rusoj kaj sovetianoj estis edukitaj, kun konkretaj sekvoj ĝis nun.

La sinistra mafieca kulturo, kiel ĝi estas konata ankaŭ de Italio, Usono aŭ Japanio, malkaŝe prosperis en Rusio dum la regado de la kvazaŭdemokrato Boris Jelcin en la 1990-aj jaroj, kiam la organizata krimo – nomata "rusa mafio" kaj elpaŝanta en formo de posteuloj de la sovetia mafio kiel la fifamaj bandoj de Izmajlovskaja, Solncevskaja, Tambovskaja kaj Maliŝevskaja –, kontrolis partojn de la rusia ekonomio. Ankaŭ Putin, kiu poste "neŭtraligis" kaj malpotencigis ĉi tiujn grupojn, laŭdire havis kaj konservis personajn kaj komercajn rilatojn kun reprezentantoj de tiuj bandoj, precipe dum sia tempo en Sankt-Peterburgo ĉirkaŭ 1991, ekzemple en la sferoj de la droga kontrabandado, kontraŭleĝaj montranspagoj kaj monlavado. Pro tio la rusia prezidento ŝajnas kultivi certan simpation por ĉiaspecaj rusaj kaj internaciaj krimuloj, precipe kiam ili servas al liaj ekonomiaj kaj politikaj interesoj kaj celoj – ĝis Donald Trump –, kiel diversaj aŭtoroj (kiel Catherine Belton) klarigis la funkciadon de la reto de Putin, kiun ili vaste esploris. Ankaŭ Garri Kasparov komparis la Putin-mafion kun la gangsteraj figuroj de Mario Puza en ties romanoj kaj filmoj, konsiderante Putin mem kvazaŭ kiel "capo di tutti i capi" ("boss bossov" en la rusa lingvo) kaj krom tio la eventuale plej riĉa homo de la mondo.

Ankaŭ en hodiaŭa Rusio, kiu estas submigrata de la "deep state", ĉiu ajn povas fari la plej aĉajn krimojn senpune, se ili utilas al la interesoj de la regantoj de la Putin-reĝimo. Ŝajnas, ke Putin mem kredas, ke li kaj lia bando povas permesi al si ĉion ajn, kion ´dio malpermesis´, senkonsidere al la landa konstitucio (kiun oni laŭdezire ŝanĝas, adaptas aŭ kompletigas). Antaŭ ĉio li opinias, ke ankaŭ li povas fari ĉiuspecajn malbonaĵojn, kiujn antaŭ li ankaŭ aliaj permesis al si, precipe usonanoj, rivaloj kaj modeloj samtempe: invadi aliajn landojn, gvidi militojn (Kosovo, Irako, Kuvajto, Sirio, Libio), murdi homojn, kidnapoj, ĉantaĝoj … Devas ekzisti "egaleco".

Alia minaco ekzistas flanke de ekstremaj radikaluloj kiel Kadyrov, Prigoĵin, Girkin, Medvedev kaj Solovjov, kiuj instigas la rusian prezidenton apliki pli drastajn rimedojn kontraŭ Ukrainio, "rekomendante" ĵeti atombombojn kaj reenkonduki la mortpunon por armeaj respondeculoj, kiuj malsukcesis en la milito. Putin povus aŭskulti ilin, ĉar ili estas gravaj opiniestroj reprezentantaj grandan parton de la popolo. En la realeco ili estas mizeraj – kaj brutalaj – marionetoj kaj lakeoj de la putinisma reĝimo, por kiuj la penso pri murdo kaj neniigo de la malamiko estas parto de ilia ĉiutaga laboro. Ĉu la tuta anoncado de la putinistoj pri atombomba scenaro povas esti konsiderata nur kiel blufo, kiel multaj observantoj opinias, estas malfacile pritaksi, ĉar Putin diris, ke li ne blufas.

Fakte minacoj per nukleaj atakoj flanke de Rusio estas nenio nova; ili kutimas atingi novan kulminon, kiam en la potencludo la rusoj celas timigi, premadi, ĉantaĝi aŭ devigi la Okcidenton por atingi iun celon. En 1959 12 sovetiaj nukleaj raketoj de la tipo R-5M, NATO-kodo SS-3, celis pafi kontraŭ Okcidenta Eŭropo elde la teritorio de GDR, kie la sovetianoj (Ĥruŝĉov kaj Bulganin) starigis tiajn raketojn. En oktobro 1962 sekvis la fama Kuba Krizo, dum kiu Sovetunio (denove sub Ĥruŝĉov) ekspedis perŝipe proksimume 80 nukleajn raketojn al Kubo kaj, en la konflikto kun Usono, kondukis la mondon al la rando de nuklea milito. Sovetunio ankaŭ minacis Ĉinion per atombomboj dum la Mao-epoko kiam la konflikto inter

ambaŭ landoj eksplodis.[4] La rusoj ĉiam elektas la maksimuman minacon. Kial do ĝuste la aktuala ŝtatestro de Rusio, kiu tre taŭgas por tiaj seriozaj "ŝercoj", volus rezigni pri tia minaco kontraŭ Ukrainio kaj Okcidento? Kun Putin la mondo havas ŝtatestron, kiu estis metita sur la sama nivelo kiel Hitler kaj Stalin en 2014 en Ukrainio kaj ne nur tie kaj tiam. Kompreneble, Putin, kiu volas ŝanĝi la ordon de la mondo en propra senco, subtenas ĉiajn kontraŭ-okcidentajn friponajn reĝimojn, de Irano kaj Sirio ĝis Mjanmaro, de Venezuelo ĝis Kubo kaj Nordkoreio, nur por nomi kelkajn fifamajn kazojn akuzitajn pri multaj seriozaj lezoj de la homaj rajtoj (klare, la Okcidento subtenas ne malpli terurajn ŝtatojn sur ´la alia flanko´. Kaj tiuj kontraŭ-okcidentaj friponaj reĝimoj subtenas Putinon. Temas pri ege danĝeraj ŝtatoj, de kiuj kelkaj probable volus vidi Okcidenton forbruli en atoma cindro, inkluzive Ruslandon. Kritikata estas en Okcidento ankaŭ la proksimeco de komunisma Ĉinio al Rusio, kiu estas suspektata pro tio, ke ĝia gvidanto Xi avancis kiel komplico de Putin (sed li ŝajne retenas sian entuziasmo por Putin). Kun Ĉinio, alia probable ankoraŭ pli danĝera ludanto, povus aperi eĉ pli da problemoj en estonto, ekzemple pro Tajvano. Sed la gvidantaro en Pekino evidente ne havas intereson esti kondamnita kaj traktita kiel "kanajloŝtato" fare de la Okcidento, ĉar tio malhelpas la internacian komercon.

Nature korupto daŭre turmentas ankaŭ Ukrainion. La lando ankoraŭ suferas pro la malnovaj pens- kaj agmanieroj, kiujn ĝi fatale heredis de Rusio kaj Sovetunio, kiun la usonanoj apostrofis kiel „imperion de la malbono". La legendeca t.n. "homo sovieticus" ankoraŭ ne elmortis ankaŭ en Ukrainio. Male al Rusio Ukrainio volas, per la helpo de Eŭropo, nun plibonigi la situacion tiurilate, dum Rusio pli kaj pli refalas en la malnovan putran marĉon de la korupto kaj krimo. Integri Ukrainion en la eŭropajn kaj okcidentajn strukturojn estus promesplena opcio por purigi la landon kaj socion de long-establitaj mensaj kaj praktikaj problemoj, sen garantio, ke la ideala situacio povos esti atingita.

### Kiu vere estas Putin kaj kion li reprezentas?

Kiam Putin en 1999/2000 estis instalita kiel ĉefministro kaj prezidento de la Ruslanda Federacio, la ekstera mondo fakte malmulte sciis pri tiu homo, nur kelkaj konantoj de la moskva politika scenejo sciis, kiu estas Putin, kaj la tuta mondo miris kial Jelcin "elektis" kaj "proponis" ĝuste tiun ĉi nekonatan, grizan figuron el la aparato de la kremla administracio kiel posteulon – kiun oni nomis "Nobody". Nu, en aŭgusto 1996 Putin fariĝis vicestro de la Kremla Administracio pri nemoveblaj konstruaĵoj, de marto 1997 ĝis majo 1998 li servis kiel vicĉefo de la Prezidenta Administracio de la Ruslanda Federacio kaj estro de la Ĉefa Kontroladministraco de la Prezidento de la Rusa Federacio. De julio 1998 ĝis aŭgusto 1999 li estis direktoro de la enlanda sekreta servo FSB, de marto 1999 krome sekretario de la Sekureca Konsilio de la Rusa Federacio. Tio estis sufiĉe miriga kaj rapida kariero, kiu progresis grandparte ekster la atento de la vasta publiko. Oni do ne longe devas pripensi aŭ serĉi respondon al la

---

[4] Certe ankaŭ la usonanoj havis la ideon (kiu estis longe konservita sekreto) uzi atombombojn kontraŭ Ĉinio (kaj Sovetunio): Truman (dem.) dum la Korea milito (1951) kaj Eisenhower (rep.) dum la Tajvana Krizo (1958). Dum la Kuba Krizo (1962) Kennedy (dem.), alvokante la sovetian registarestron Nikita Ĥruŝĉov retiri la nukleajn raketojn el Kubo, minacis per nuklea kontraŭbato okaze de sovetia atako (Fidel Castro siaflanke eĉ postulis unuan nuklean atakon kontraŭ Usono okaze de usona invado, sed Ĥruŝĉov rifuzis la deziron). Kiel pledanto por la apliko de nukleaj armiloj evidentiĝis siatempe la franca ŝtatestro Charles de Gaulle, kiu postulis en majo 1961 adekvatan demonstron de forto kontraŭ Ĥruŝĉov, al kiu oni volis klarigi, ke sovetia armea agado en Berlino kondukus eble ankaŭ al nuklea milito. Okaze de laborvizito de federacia kanceliero Ludwig Erhard en junio 1964 en Parizo, de Gaulle proponis tujan uzon de francaj nukleaj armiloj okaze de milita konflikto pri Berlino aŭ FRG. Poste publikigitaj sekretaj militaj planoj montris, ke Usono konsideris la uzon de nukleaj armiloj kiel plej lastan rime-don en milito pri Berlino (1961). La utiligo de atombomboj ankaŭ estis konsiderata dum la Vjetnama milito: En intervjuo kun *New York Times* Nixon (rep.) deklaris, ke li pripensis apliki atombombojn kvar fojojn dum sia oficperiodo, inter alie por fini la Vjetnaman militon. Eĉ se nukleaj armiloj finfine ne estis aplikitaj, ili pruviĝis utilaj almenaŭ kiel rimedo de minaco, premo aŭ grava parto de la milittaktiko. Al la rusoj kaj Putin tiuj okcidentaj "strategioj" por "solvi problemojn" de la pasinteco certe estas konataj, kaj ŝajnas, ke ili nun utilas por uzi ilin kontraŭ la Okcidento.

demando, kial aŭ ĉu KGB/FSB instalis Putin kiel novan prezidenton de Rusio: Kiel direktoro de FSB, al kiu Jelcin nomis lin, *Putin mem estis la KGB*, kiu instalis sin kiel prezidenton, kun la beno de Jelcin, al kiu Putin estis trudita kaj kiu ne havis alternativon ol konsenti. Ĝuste al tiu Jelcin, kiu tiel batalis kontraŭ la malnova sistemo dum la 90aj jaroj, oni povas aŭ devas riproĉi, ke li subtaksis la danĝeron, ke kun Putin povus reveni ankaŭ la malnova KGB-kulturo. Kun Putin oni ne havis spertojn, ke li estas fidinda demokrato aŭ reformisto, kiu ankaŭ pozitive kunlaboros kun la Okcidento. La malo okazis poste. Ĉu Jelcin estis tiel malsana aŭ ebria, ke kun sia fama instinkto li ne povis antaŭvidi tion kaj ne plu komprenis kio okazas? Ekzakte en ĉi tiu cirkonstanco konsistas la nekomprenebleco kaj enigmeco de lia decido elekti Putin kiel posteulon. En kiu ajn stato Jelcin siatempe troviĝis kaj kiel ajn enigma lia decido estis, hodiaŭ lia tiama rolo devas esti rigardata multe pli kritike ol antaŭ 20 jaroj – krom se Jelcin estis trompita de la putinistoj, kio ne estas ekskludebla. Eble li estis sub la premo de la KGB-uloj aŭ interkonsentis kun ili pri Putin. Alia centra faktoro, kiu ludis esencan rolon ĉe la elekto de reala Jelcin-posteulo kaj kiu parolis por Putin kiel lia posteulo estis, ke la Jelcin-familio konsideris Putin sufiĉe fidinda, se temis pri la protektado de Jelcin kaj lia familio antaŭ jura persekutado. Nur Putin kiel centprocenta homo de KGB ŝajnis esti kapabla doni tiun garantion. Tiel Putin, pri kiu flanke de Jelcin (kaj aliaj) do evidente ekzistis neniuj duboj, fariĝis la ĉefa favorulo de Jelcin (kaj aliaj), des pli ke Putin promesis, ke li malhelpos reveni la komunismon kaj daŭrigos la reformojn. Fakte la unua dekreto, kiun Putin subskribis kiel nova prezidento, rilatis al tiu ĉi punkto, kiu estis esence grava por la trankvila kaj netuŝebla pluvivado de Jelcin kaj lia familio. Do Putin tenis siajn bazajn promesojn, eĉ se la evoluo de la lando iris poste en alia direkto.

Oni devas supozi, ke tiuj iamaj KGB-uloj kaj "silovikistoj" daŭre havas grandan influon kaj en la fono regas Rusion kaj faras la ĉefajn decidojn, kiujn Putin devas publike anonci (sed tio ne absolvas lin de la faritaj krimoj). Sed Putin intertempe certe ankaŭ memstariĝis sendependiĝis, suverene regante tiujn "silovikistojn", kiel imprese kaj embarase montris la kunsido de la Sekureca Konsilio la 21an de febrauro 2022. Al tiuj "silovikistoj" apartenas Nikolaj Patruŝev, kiu supo-zeble estas la sekreta regestro de Rusio, dum la putinisma ideologio estis kreita, formita aŭ almenaŭ influita de sinistraj figuroj kiel Dugin, Ĵirinovskij kaj pluraj aliaj malpli konataj poli-tikaj "filozofoj" de la "rusa mondo", kiuj pretendas reprezenti parton de la publika opinio en Rusio.

En la pasintaj 2 jardekoj estis publikigitaj pluraj biografioj kaj intervjuoj pri/kun Putin de malsamaj aŭtoroj en diversaj lingvoj. Sed neniu el ili sukcesis enprofundiĝi aŭ penetri en la profundon de la supozataj sekretoj de ĉi tiu viro por ekscii kaj fine klarigi la esencon aŭ veron pri Putin: Kiu estas Putin kaj kion li reprezentas? Kiel Putin povis estiĝi kaj kiel la Putin-fenomeno estas klarigebla? Kial Putin povis konservi la povon tiel longe malgraŭ pluraj krizoj? Ktp. Tio povas esti, ĉar tiu ĉi ruso mem evitis kaj evitas respondi tiujn demandojn almenaŭ en iliaj plej tiklaj aspektoj, preferante, kiel li lernis kiel agento de KGB, kaŝi sian biografion, igi ĝin mito kaj legendo kaj trompi la publikon, kiu ne devus scii la tutan veron.

Dum Putin kutime aspektas afable, senkulpe kaj anĝelece por prezenti sin kiel humaniston kaj bonfaranton, li eble estas unu el la plej grandaj politikaj kaj ekonomiaj krimuloj de la 21a jarcento ĝis nun. Malgraŭ blankaj makuloj la homaro povis ekhavi sufiĉe bonan imagon pri Putin kiel persono kaj politikisto dum la lastaj 20 jaroj, post kiam komence li estis perceptita kiel obskura mistero kaj poste bonvole dorlotata de Okcidento pro la volo havi pacon kaj komercadi kun Ruslando por multaj jaroj, kvankam li kondutis politike pli kaj pli diktatoreca kaj kontraŭ-okcidenteca.

La politiko de Putin apogas sin sur du kolonoj: unue – praktike – sur la konservado de la potenco far la Kreml-dependa Putin-klano, konsistanta ĉefe el iamaj kolegoj de KGB, komercistoj kaj civilaj sekurecaj servoj el la Sankt-Peterburga tempo, kaj due – ideologie – sur la venĝa finkalkulado kun la Okcidento, kiu perfidis kaj humiligis Rusion, kiel la putinis-

toj kredas (aŭ ne kredas), kaj kiu finfine rifuzis Putin kiel personon (krom kelkaj esceptoj kiel la italo Berlusconi, la germano Schröder kaj eble la hungaro Orbán). La sorto de la rusa popolo ne multe interesas lin, ĉar pri popolo, konsistanta el alkoholuloj kaj pigruloj, kiel li opinias, li havas malfavoran opinion. Kaj patriotismo estas io por la stultaj amasoj, kiuj devus apogi liajn politikon kaj sistemon. Oni eĉ dubas, ke Putin estas vera rusa naciisto. Ĉi tiu kredo povis esti nur preteksto, ruza truko por longtempe konservi lin kaj lian kaston en la povo, uzante la "Putin-plimulton" por kontroli la landon, administri la ekonomiajn resursojn kaj redistribui la riĉaĵon.

Tiel Putin ludas politikon kun du malsamaj maskoj: Kun la masko de la bonvolema humanisma caro por tiuj, kiuj apogas, laŭdas kaj flatas lin kaj konsentas kun li, kaj kun la masko de la kruela venĝema diktatoro, kiu konas neniun pardonon ĉe perfiduloj kaj severe punas ĉiujn kritikantojn kaj kontraŭulojn. Kun ambaŭ maskoj li restas tre danĝera, kaj por Rusio mem, por ĝiaj najbaraj landoj kaj la tuta mondo. Ĉar ĉi tiu viro ne plu povas kalkuli pri tio, ke li estos bonvena en la okcidenta mondo, li rompis ĉiujn pontojn al la Okcidento malantaŭ si kaj nun alkroĉas sin al la grupo de ŝtatoj de la tiel nomata "Ŝanhaja Organizo", en kiu senskrupulaj maldemokratiaj perfortaj potenculoj de Azio unuiĝis kontraŭ la Okcidento. Ĉu tiu geostrategia alternativo estas en la intereso de la rusa popolo, estas alia demando. Oni pre-ferus esti "sur egala alteco " kun la Okcidento, kiun la rusoj malgraŭ ĉio ĉiam admiris kaj al kiu ili ŝatus aparteni.

Nun Putin batalas ankoraŭ kontraŭ la ukrainoj kaj la Okcidento… evidente sen granda sukceso (intertempe la ukrainia milito estis reinterpretita de Putin kiel milito kontraŭ NATO). Ŝajnas, ke Putin volas esti la plej potenca, plej forta, plej saĝa kaj plej riĉa homo en la mondo, kiu ne plu estas superebla. Ĉu ĉi tie temas pri perversa, panika kaj senespera provo venki la propran legendecan komplekson de la sento esti malpli valora? Tio ŝajnas esti lia tute privata formo de la venĝo kontraŭ la mondo, kiu laŭ lia kredo trompis, ofendis kaj humiligis lin kaj Rusion. Li ŝatas ruze ekspluati la malfortojn de siaj kontraŭuloj, trompi kaj superruzi ilin, ĉiutage anonci iun skandalan provokon, tiel ke oni ne plu povas ĉesi miradi kaj la tutan tempon devas timi lin kaj Rusion. Li disponas pri la kapablo reagi fulmrapide, fari kurtan proceson kaj finkalkuli kun siaj malamikoj (la listo estas longa). Ĉi tio inkluzivas senfinan mensogadon, inversigon de faktoj kaj resendon de la kulpo al aliaj, kio ŝajnas esti speco de rusa nacia sporto (kun kaj sen dopado). Putin eble estas malaltkorpa, malbela, senhumura, enuiga tipo, kun vitreca suspektema rigardo kaj abomena voĉo (tiel vidas lin karikaturistoj), sed li ĉiam estas pli forta ol ĉiuj aliaj, kvazaŭ la "Superman-o" en si mem, kaj li estas decidema por agi konsekvence, senkompate kaj senskrupule kaj se necese kun plenforta brutaleco (kiel dirite perfidon kaj humiligon li ne eltenas). Eble li estas efektive la renaskiĝo de Hitler aŭ Stalin, aŭ li estas la nuntempa realiĝo de unu el la maliculoj en la romanoj kaj filmoj de "JB 007". En pluraj rilatoj la simileco de Putin al ĉiuj tiuj hororfiguroj estas okulfrapa. Probable li lernis siajn "kvalitojn" kiel leningrada strathuligano, en la luktosporto kaj ĉefe ĉe la KGB kaj en la rusa mafia kulturo de la 90aj jaroj, por fariĝi sama bestio kiel la nomitaj antaŭuloj. Alimaniere oni ne povas klarigi tiun fenomenon. Por resti en la nuntempo oni povas facile meti Putin en la grupon de figuroj kiel Saddam Hussein, Assad, Gaddafi, Ĥamenei/Raisi, Kim Jong-un, Erdogan, Lukaŝenko, Xi Jinping kaj aliaj gvidantoj de la plej teruraj "kanajlaj" ŝtatoj de la mondo. Inter la vivantoj ĉiuj estas kandidatoj por Hago. Kia te-rura prezidento, kiun Ruslando sin permesas! Kia terura historio, kiun li trudis al Ruslando!

La reviziisma kaj revenĝisma interpretado de la historio, kiun Putin praktikas, estas fundamente erara, altgrade falsa kaj mensoga kaj tute misgvida eĉ el rusa (liberala) vidpunkto, kaj probable li mem ekzakte scias ĝin. Sed li tamen faras ĝin por provoki, maltrankviligi kaj malfortigi la Okcidenton, kiun li malamegas, por alporti Ukrainion (kaj aliajn landojn de la regiono) "hejmen al la regno", krom sekurigi propran lokon en la historio kiel Petro la Gran-da. La ĉefa celo estas firmigi aŭ pligrandigi la propran popularecon, konservi kaj vastigi la propran

potencon kaj eviti la perdon de la kontrolo de la sekretservaj kaj "silovikistaj lobioj" pri Rusio, kiuj samtempe regas la ekonomion. Militoj plilongigas la vivon de imperioj kaj diktaturoj. Ĉiuj militoj, kiujn Putin komencis en kaj ĉirkaŭ sia imperio, servis ĉi tiun celon. Ĉi tio estas esenca misuzo de politiko kaj historiografia politiko. Ĉiuj postsovetiaj najbaraj ŝtatoj kaj diversaj aliaj eksteraj landoj suferas hodiaŭ la sekvojn de ĉi tiu politiko. Sub ĉi tiuj pravigaj premisoj Putin povas esti kapabla iam ajn ordoni atakon kontraŭ aliaj postsovetiaj ŝtatoj sub la preteksto de la historia aparteneco al la Ruslanda Imperio. Estas ŝoke, ke la rusoj aŭ rusianoj ankoraŭ ne komprenis tion. Aŭ ĉu ili tamen komprenis ? Aŭ ĉu ili ne interesiĝas ankaŭ pri ĉi tiu demando, ĉar ili kredas, ke ĉiuokaze ili ne povas ŝanĝi la potenc-ekvilibron en Rusio? Absurda sinteno!

Nova libro de la brita milit-ĵurnalisto John Sweeney, kiu dokumentis la supozeblajn militkrimojn plenuitajn de rusaj soldatoj en Buĉa, estas titolita "Murdisto en la Kremlo". Jam en la unua ĉapitro la aŭtoro skribis, ke Putin estas malforta, aŭtoritatema personeco, kiu suferas altgradan paranojon kaj sidas en sia kastelo kiel siatempe Stalin. La invado estis fuŝita pro nekompetenteco, malfido, korupto kaj hipokriteco en la plej altaj gvidstrukturoj, ĉar oni neglektis la bezonojn de la soldatoj, kies moralo en la armeo estas malbona, sed ankaŭ ĉar la rusoj subtaksis la rezistkapablon de la ukraina armeo kaj ĝenerale mistaksis la situacion en Ukrainio. Unu el la "herooj" de lia libro, Semjon Hluzman, kiu dum la sovetia epoko pasigis 10 jarojn kiel opozicia psikiatro en la Urala gulago, klarigis al la raportisto kiel funkcias la pensmaniero de la iama KGB-ulo Putin. Ĉu Putin estas freneza? „Ne, li ne estas freneza. Li estas tre malica. Mi certas, ke li estas tute sana. Li havas tre specialan personecon. Ne tiun de KGB-oficiro. Li estas malsama, li estas sadisma, li ne zorgas pri aliaj homoj, eĉ ne pri la rusa popolo mem. Li zorgas nur pri si mem. Simile kiel Hitlero kaj Stalino antaŭ li. ... Ili estis simple malbonfaruloj, sadistoj. Sed ili ne estis mensmalsanaj. ... Kiam oni diras, ke iu estas mensmalsana, oni absolvas tiun personon de la respondeco pri ĝiaj agoj. Tiam tiu persono ne plu respondecas pri tio, kion ĝi faras.“ Laŭ Hluzman Putin tute ne estis tipa KGB-oficiro, kiu ekzemple persekutis disidentojn. KGB-anoj havas malsamajn personecojn same kiel ĉiuj aliaj homoj. Sed Putin estas „unika“. Nu, kiel konate, kompari Putin-on kun Hitler kaj Stalin estas ankoraŭ kontestata. Oni eble aldonu Mussolini, Pinochet kaj kelkajn aliajn al ĉi tiu listo por kompari la diversajn tipojn kaj karakterojn. En la publico Putin estis vidata pli proksime de la faŝismo ol de la komunismo. La tipologia komparo povis esti psikologie interesa. Baziĝante sur la pritakso de Hlusman, ankaŭ Sweeney ne konsideras Putin psikopato, sed tamen persono kun „katastrofe malvasta mondrigardo“ kaj „tunelvizio“, kiu krom tio estas kaptita de „sinistra kaj falsa kredo pri la perfido.“ Nu, Putin verŝajne respondus, ke lia mondrigardo estas ege vasta, ĉar li celas reunuigi la disan rusan teron, kiu ampleksas orientan Eŭropo, tutan Kaŭkazion kaj Mezazion …

La homaro nun ŝajnas kompreni kiu estas Putin kaj kion li celas. Se Putin ne havus gason kaj nafton kaj nukleajn armilojn plus kelkajn maloftajn krudtrezorjn, li kaj lia Rusio estus absolute nenio kaj Rusio povus esti traktita alimaniere. Se Putin uzus nukleajn armilojn, la ruĝa linio estus absolute transpasita, kaj la Okcidento, t.e. Usono, estus devigita efike reagi. Tiukaze Putin verŝajne devus esti senprokraste eliminita el la trafiko. Oni opinias, ke nur la rusia popolo, reprezentata de sia politika elito, kapablus fari tion, ĉar ekstera enmiksiĝo verŝajne signifus internacian militon.

Dum Putin do regos kiel diktatoro, aŭtokrato kaj militestro en Rusio ne regos trankvilo nek paco en Oriento. Rusio devas esti rigardata kiel altgrade danĝera terorŝtato, kies militplanoj devas trovi la deciditan reziston de la libera demokratia mondo. Rusio do devos esti traktata eĉ pli severe de la internacia komunumo. Bedaŭrinde nukleaj armiloj daŭre estas necesaj por teni Rusion sub kontrolo.

Sed atenton! En Rusio ekzistas eĉ pli radikalaj fortoj ol Putin, kiu ŝajne scipovas taksi siajn limojn realisme. Se veraj rusaj radikaluloj akaparus la potencon, ekzemple en puĉo, la situacio

denove povus ŝanĝiĝi al eĉ pli danĝera direkto. Se pli pacamaj politikistoj transprenus la povon en Rusio, la monda paco eble povus esti savita – cetere ankaŭ en la intereso de Ĉinio.

Ĉar el la vidpunkto de la sekretaraj servoj kaj silovikistoj, t.e. de la "deep state", Putin faris bonegan laboron ĝis nun, li estas plutenata en la potenco fare de tiuj strukturoj, kiuj protektas lin. Atenci aŭ puĉi kontraŭ Putin estas verŝajne malfacile, ĉar nur malmultaj fidinduloj havas aliron al li kaj la diversaj gvardiaj trupoj bone zorgos, por ke la scenaro de atenco aŭ puĉo ne okazu.

**Putin kiel militkrimulo, amas- kaj popolmurdisto, ekonomia ĉantaĝisto kaj minacanto per nuklea milito?**

Post la komenco de la rusia militagreso kontraŭ Ukrainio en februaro 2022, kiun Putin ordonis, kaj precipe post la unuaj incidentoj, kiujn oni suspektis kiel militkrimojn, la Kreml-estro estis klasifikita de diversaj okcidentaj politikistoj kiel ebla militkrimulo, kiu kun sia Kreml-bando iam estos transdonota al la koncerna tribunalo en Hago, kiam ĝi instaliĝos lige kun la supozataj rusaj militkrimoj en Ukrainio. Eĉ gravaj reprezentantoj de la kutime rusema germana SPD konsideras Putin militkrimulo. Pruvoj estas nun kolektataj. Kion Putin faris en sia lando kaj aliaj landoj, precipe en Ĉeĉenio kaj Ukrainio, devas esti rigardata ne nur kiel militkrimoj, sed ankaŭ kiel grandskalaj krimoj kontraŭ la homeco kaj homaro.

La regantoj en Moskvo respondecas por la detruado de Ukrainio kaj devas esti akuzitaj pri (supozeblaj) militkrimoj plenumitaj de rusiaj trupoj en Ukrainio. Putin, rusa provokisto kaj agresmilitisto kun internacia signifo, kiel tian la mondo ne plu vidis dum longa tempo depost Hitlero, portas la personan respondecon por la milito kontraŭ Ukrainio kaj la interrompo de la mondpaco. Ĉiuj rusoj, kiuj portas centran respondecon en ĉi tiu barbara milito – politikistoj, diplomatoj kaj ĵurnalistoj, kiuj subtenas la agreseman militpolitikon de Putin – , devas esti respondecigitaj por la teruraj krimoj de la Putin-reĝimo en Ukrainio. Neniu militkrimulo povu eskapi kaj resti senpuna.

La ukraina registaro malkaŝe priskribas Rusion kiel terorisman ŝtaton – pli drasta kvalifiko verŝajne ne eblas. La ukrainoj eĉ vidas paralelon al la Islama Ŝtato. En Okcidento Putin nun estas konata ankaŭ kiel "gasteroristo". Gaso estas efika armilo de Ruslando kontraŭ Eŭropo por ĉantaĝi ĝin. Post kiam alia rusa ĉantaĝo malhelpis la eksporton de greno el Ukrainio, li estis konsiderata kiel "nutraĵteroristo", ĉar li sekvigis aŭ enkalkulis nutraĵkrizon en diversaj landoj, precipe afrikaj. Kiu ajn ŝtato Rusio estas, ĝia reveno al la "civilizita" mondo estas apenaŭ imagebla dum la Putin-regado, precipe ĉar ĉi tiu viro ankaŭ provis kaj faris ĉion por subfosi kaj eksplodigi la demokratiajn strukturojn de la okcidentaj ŝtatoj, inkluzive de Usono. Konsiderante la multmilojn da homaj viktimoj kaŭzitaj de la ordonitaj militoj de Putin, ne estus troigo kvalifiki ĉi tiun individuon eble eĉ kiel amasmurdiston. Andrej Illarionov, iama ekonomia ĉefkonsilisto de Putin, klarigis en interparolo kun la ukraina ĵurnalisto Dmitrij Gordon, ke la legaleco aŭ legitimeco de ĉi-rilataj ordonoj de Putin devas esti kontrolitaj laŭ la leĝaro de la Ruslanda Federacio. Ĉar dum sia regado Putin plurfoje minacis la mondon per la apliko de nukleaj armiloj, estus konvene klasifiki lin kiel "nuklean teroriston" – aŭ almenaŭ "ĉantaĝisto". Nur gangsteroj, krimuloj, kanajloj kaj psikopatoj minacas la homaron per nukleaj armiloj, eĉ se ili faras tion sub la preteksto de la memdefendo. Sed kiel la afero aspektas laŭleĝe, laŭ la internacia juro? Kia puno estus ebla aŭ taŭga por Putin? Dumviva aresto (en Nederlando)? Mortpuno (en Rusio) aŭ restado en siberia malliberejo? La ŝanco, ke li eskapos akuzon, procesigon kaj kondamnon, estas granda. Male al Milošević li certe ne libervole transdonos sin al la mortiga malamiko en la Okcidento. Multo dependos de tio, kiel nova rusia registaro rilatas al ĉi tiu afero.

En la multaj militoj, kiujn Putin kaj ties amikoj – de Jelcin ĝis Medvedev – iniciatis kaj gvidis en pli fruaj jaroj de sia regado ne nur en Ukrainio, kaj en kiuj miloj da homoj perdis la vivon, oni ja devas paroli pri intencitaj amasmurdoj al la koncernitaj popoloj, do pri provita genocido, precipe en la kazo de la ĉeĉenoj – kaj ukrainoj. Tiuj ĉi intencoj, kiuj estas supozataj ĉe Putin, estas ligitaj kun la profunda malamo, kiun ĉi tiu rusa naciisto sentas pri diversaj popoloj ne nur en la propra influsfero, sed ankaŭ ekster ĝia spaco, kaj per kiu li infektis kaj poluis grandparton de la ruslanda popolo mem.

Serioza kritiko kontraŭ Putin venis ankaŭ de neatendita, sufiĉe nekonata flanko – de Oleg Daniloviĉ Kalugin, iama altranga KGB-oficiro loĝanta en ekzilo en Usono (kiel ĝia civitano), kiu perdis sian honoron en la Putin-erao kaj en Rusio estis akuzita kaj kondamnita pro ŝtatperfido kaj spionado favore al la Okcidento. La verdikton de 15 jaroj da arestado en mallibereje kun severa reĝimo li priskribis kiel "sovetian justecon, kiu hodiaŭ vere triumfas." Kalugin restis kritikisto de Putin, iama KGB-subulo, kiun li ne hezitis nomi "militkrimulo" pro lia esenca respondeco en la dua ĉeĉena milito. Li opinias, ke la rusia prezidento iam devos esti transdonita al internacia tribunalo, ĉar liaj krimoj kontraŭ Ĉeĉenio devus esti severe punitaj same kiel en la kazo de la respondeco de la iama jugoslavia prezidento Slobodan Milošević por la krimoj plenumitaj dum la jugoslaviaj miltoj de la 1990aj jaroj.

## Kaj la aliaj krimoj?

Sed ĉe Putin ne temas nur pri militkrimoj. Alia ĉapitro estas la multnombraj (menditaj) murdoj al politikaj kontraŭuloj, ĵurnalistoj kaj "perfiduloj" en Ruslando, el kiuj iuj estas atribuitaj al la respondeco de Putin. En intervjuo de marto 2021 kun "ABC News" la usona prezidento Joe Biden jese respondis la demandon de ĵurnalisto pri tio ĉu Putin estas "murdisto". Ne estis klare, al kiuj murdoj de Putin Biden aludis. Supre menciita Andrej Illarionov vidas la aferon, kiel dirite, en iom pli diferencita maniero kaj preferas ligi la terminon "murdisto" aŭ "krimulo" al la rusia leĝaro. Tamen la elstara ekonomia ekskonsilisto de Putin atentigis, ke la rusia prezidento donis diversajn ordonojn, sekve de kiuj tre multaj homoj perdis la vivon, eble temas pri dekmiloj, se oni ankaŭ konsideras la diversajn militojn, kiujn Putin ordonis kaj gvidis. Do ni havas kazon de ŝtatestro, kiu verŝajne responecas por sennombraj tragikaj homaj sortoj kaj pereoj en diversaj okazoj, kiuj povintus esti evititaj. Sendependaj juraj instancoj, juristoj, advokatoj, juĝejoj kaj tribunaloj devus esplori kaj prijuĝi tiujn kazojn, sed en Rusio mem tio nuntempe ne eblas. Ĉiukaze Putin estas figuro, kiu alportis multe da sufero al multegaj homoj en plej diversaj okazoj, kuntekstoj kaj landoj – eble temas pri milionoj da diverstipaj viktimoj, se oni kunkalkulas ĉiujn ukrainajn rifuĝintojn, kiuj devis forlasi siajn urbojn kaj vilaĝojn pro timo de la putinaj bomboj, raketoj kaj grenadoj. Ĉar estos malfacile, eĉ neeble, persone pruvi iujn murdojn de Putin, ĉar ĉiuj spuroj verŝajne estis forviŝitaj, la debato pri la respondeco pri militkrimoj almenaŭ restos sur la tagordo kaj eniros la historilibrojn kiel tre malagrabla kaj embarasa temo, se ili ne estos prisilentataj.

## Aliaj eblaj militkrimuloj

Se oni parolas ankaŭ pri eblaj aliaj rusaj militkrimuloj, nun ankaŭ Putin-amiko **Dmitrij Medvedev** pruviĝis kiel instrumento de la absoluta malbono. Kiel vicĉefo de la Sekureca Konsilio de Rusio li jam plurfoje malkaŝe minacis per apliko de nukleaj armiloj kontraŭ la Okcidento kaj promesis al Ukrainio okazigi la Lastan Tribunalon. Kiam ĉi tiu ridinda marioneto de Putin estis formala prezidento de Rusio de 2008 ĝis 2012, funkciante praktike nur kiel plumpa anstataŭanto de Putin por gardi lian lokon, la trompita mondo kvazaŭ enamiĝis al li, glorante lin kiel liberalisman reformanton kaj lumturon de la espero, ĉar oni konsideris lin pli bona alternativo al Putin. Kvankam intertempe jam neniu plu konsideras Medvedev potenca

kaj serioza politikisto, la ŝokaj mesaĝoj de la akra laŭtparolilo de Putin, kiujn li ´private´ distruadas en sia ´Telegram´-kanalo, tamen estas atentindaj, ĉar ili permesas eblajn konkludojn pri la intencoj de la Kremla ĉefreganto, kiu mense verŝajne jam perdis la skrupulojn, se temas pri ĵetado de nukleaj bomboj kontraŭ siaj malamikoj ekster Rusio. Kvankam ĉe Medvedev temas nur pri vortoj, esperebIe ankaŭ tiu ĉi terura militprovokisto de la Putin-reĝimo iam troviĝos inter la arestitaj akuzitoj antaŭ la Tribunalo pri Militkrimoj por Rusio en Hago aŭ kie ajn. La samtempanoj ankoraŭ bone memoras la bildon de la Nuremberga Tribunalo, kie sur la benkoj sidis Göring, Hess, von Ribbentrop, Keitel, Dönitz, Raeder, von Schirach, Sauckel, Kaltenbrunner, Frank, Frick, Funk, Streicher, Rosenberg …

La nomoj de eblaj rusaj kandidatoj por tia proceso aŭ dumprocesaj atestoj en Rusio aŭ eksterlando estas jam kolektataj de diversaj ŝtataj kaj neregistaraj organizaĵoj, ekzemple de la "Forumo Libera Rusio". Ĉi tiu organizaĵo riproĉas al Putin kaj Medvedev gravajn krimojn kaj misfarojn: Putin estas akuzita pri kontraŭ-konstitucia puĉo, uzurpa akaparo de la povo, korupto, organizado de terorismaj atakoj, malrespektado de la teritoria integriteco de suverenaj ŝtatoj kaj efektivigo de agresmilitoj. Medvedev estas akuzita pri partopreno en la uzurpo de la potenco kaj en kontraŭ-konstitucia puĉo, korupto, efektivigo de agresmilito kaj okupado de la teritorio de suverenaj ŝtatoj, subpremado de civilaj rajtoj kaj liberecoj kaj efektivigo de subprema politiko. Nu ĉi tiuj riproĉoj kaj akuzoj estus destinitaj unuavice por traktado antaŭ rusiaj tribunaloj, dum pri militkrimoj okupiĝus internaciaj tribunaloj de UN. La t.n. "Putinlisto" de la "Forumo Libera Rusio" (https://www.spisok-putina.org/en) inkluzivas pli ol 1500 nomojn de personoj el la ĉirkaŭaĵo de Putin en Rusio kaj servas kiel bazo por rekomendi kaj pravigi sankciojn kontraŭ la listigitaj personoj.

## La demando pri respondeco kaj kulpo

Ne ekzistas dubo pri tio, ke neniu alia ol Putin kaj liaj plej proksimaj konfiduloj (en la Sekureca Konsilio de Rusio, en la ministerioj, Dumao kaj armeo de Ruslando) unuavice portas la ĉefan respondecon pri la milito de agreso, konkero kaj neniigo kontraŭ Ukrainio, kiun ili planis kaj lanĉis fakte jam en 2014 enkonduke per la ruze aranĝita aneksado de Krimeo kaj la perforta milita enpenetro en la Donbason, – en ambaŭ kazoj temas pri ukraina ŝtatteritorio. La jura, politika kaj morala respondecoj por kaj la kulpo pri tiuj atakoj kaj militoj devus esti esplorataj kaj konfirmitaj fare de unu aŭ pluraj tribunaloj en Rusio mem.

Por multaj samtempanoj en Okcidento kaj aliloke estas tute nekompreneble kiel kaj kial la rusoj aŭ rusianoj daŭre subtenas la laŭ ilia opinio falsan politikan kurson de la subpremado kaj milita agreso de Putin, kiu multrilate memorigas pri diversaj rusaj tiranoj, kiuj subpremis la propran popolon kaj/aŭ militis kontraŭ siaj najbaroj (ne nur por defendi sin).

Fakte la rusia, ruslanda aŭ rusa popolo jam mem devus demandi sin, kiucele oni daŭre subtenas tiun politikon, kiu respondecas por ĉi tiu mizera situacio en Rusio, kiu kaŭzis tiom grandan malfelicob al Rusio mem kaj aliaj, precipe ukrainoj. Kiel ĉiam, kiam temas pri Rusio, oni alfrontas certan enigmon, kaj kiam temas pri la demando pri la respondeco kaj kulpo pri la aktuala rusia politiko ĝenerale kaj la kontraŭ-ukrainia milito aparte, oni troviĝas en dilemo. Ŝajnas, ke en Ruslando neniu volas transpreni la respondeco por kaj kulpon pri ĉi tiu milito, ĉar la respondecon kaj kulpon la rusoj, inversigante la faktojn, senskrupule ŝovas al Ukrainio kaj la Okcidento. Tie la afero estas klara: la agresanto estas sen ajna dubo Ruslando kaj la atakita lando estas Ukrainio kaj la viktimo estas la ukraina popolo. Ekzistas nur kelkaj aŭtoroj (de la tipo Krone-Schmalz), kiuj asertas, ke la Okcidento portas parton de la kulpo, ĉar ĝi provokis Rusion per la orienta larĝigo de NATO, per daŭra kritikado de Putin, altrudo de la okcidentaj valoroj al Rusio, liverado de armiloj al Ukrainio, ktp. ktp. – kvankam Putin „eten-

dis sian manon al ĝi“. Homoj, kiuj argumentas tiel, ne komprenis la karakteron de homo kiel Putin, kiun Garri Kasparov tiel trafe priskribis en sia libro.[5]

Nun pri la (malfacila) demando de la eventuala (kolektiva) respondeco kaj kulpo de la rus(land)a popolo lige kun la politiko de Putin kaj lia senkompate brutala milito kontraŭ Ukrainio.

Ekzemple por la ministro pri eksteraj aferoj de Estonio ekzistas neniu dubo, ke TUTA RUSIO kulpas pri la milito kun la argumento, ke grandparto de la rus(i)a nacio subtenas Putin ekde la komenco de lia regado per lia daŭra reelektado kiel ŝtatestro ekde la jaro 2000 jam la trian fojon. Sed kion signifas, povas signifi „tuta Ruso“ kaj kiajn sekvojn tia kolektiva kulpigo povus havi, ĉu ĝi entute eblus aŭ havus sencon?

Antaŭ ol okupiĝi pri la demando pri respondeco kaj kulpo de la rus(i)a popolo estas utile dediĉi sin al la demandoj pri la populareco de Putin, la t.n. "Putin-plimulto“ kaj la rolo de la Putin-propagando.

Efektive estis publikigitaj rezultoj de enketoj, kiuj konfirmis ĉirkaŭ 80-procentan subtenon al Putin, kvankam la rusoj bone scias pri kia tipo de homo temas; tio estas iom miriga, des pli ke estas ankaŭ konate, ke la rusoj ĝenerale tute ne ŝatas homojn ligitajn kun la KGB. Sed Putin, kiu ne estis diskreditita ĉe la popolo, evidente estis/as escepto. Lia tiama politika kariero estis ligita kun la eventoj de la jaroj 1999 kaj 2000, kiam li fariĝis subite konata kaj populara lige kun la dua milito kontraŭ la separistoj kaj „teroristoj“ en Ĉeĉenio, kiam li, kiel ĉefministro kaj prezidentec-kandidato proponita de Boris Jelcin (kiu dekretis ambaŭ ĉeĉenajn militojn), promesis fari „ordon“ en la ŝtato post la `sovaĝaj´ 1990aj jaroj.

Nature oni ne prisilentu la krudajn okazaĵojn lanĉitajn flanke de la ekstremismaj islamistoj, kiuj celis starigi mezepokecan ŝariecan reĝimon en Kaŭkazo kaj kontraŭbatalis la rusan kontrolon, kion Moskvo neniel povis toleri. En „specialaj operacoj“ Putin lasis senkompate likvidi ĉiujn tiujn islamistojn, kiujn la rusaj sekurecaj fortoj povis kapti. La senskrupula, kruda kaj sistemeca neniigo de tiuj tragikaj herooj, kiuj celis liberigi siajn landojn de la rusa jugo (pro kio ili ĝuis certan simpation) kaj estis konsiderataj kiel ŝtataj malamikoj, estas aparta ĉapitro de la krima dimensio de Putin kaj kompanio, kiu devus esti jure esplorita, kvankam oni certe ne povas kompati tiujn militemajn radikalulojn, kiuj atakis kaj mortigis aliajn homojn, kvankam ankaŭ ili havis homajn rajtojn. Sed precipe la civila popolo ege suferis, ĉar Putin militis en Kaŭkazo sen distingi senkulpajn civilajn viktimojn (pri kio multaj rusoj fajfis). Por Putin ĉeĉenoj estis/as ĉeĉenoj; ĉiu ĉeĉeno estis suspektata pro kompliceco kun la separistoj, islamistoj kaj teroristoj. La saman principon li aplikas en Ukrainio, kie li ĉasas ukrainajn separistojn, naciistojn, teroristojn kaj precipe „naziojn“. Laŭ lia logiko la ĉeĉenoj subtenas islamistojn kaj la ukrainoj apogas „naziojn“ – sekve tiuj ĝenaj popoloj devas esti likviditaj - en tiu ĉi aspekto konsistas la genocideco de liaj intencoj kaj agado. Kiel konate sub Stalin ĉeĉenoj, inguŝoj, krimeaj tataroj, ukrainoj kaj aliaj „sovetiaj“ etnoj kaj popoloj estis konsiderataj kiel komplicoj de la germanoj kaj germanaj nazioj – sekve ili devis esti deportitaj kaj malaperigitaj kiel etnoj kaj popoloj, ĉar ili estis malamikoj de la rusa popolo. La saman logikon heredis Putin, kiu en la ĉekisma KGB estis edukita en stalinisma spirito.

Ĝis 2008-11 Putin fakte ĝuis altgradan popularecon en Ruslando, kvankam tiu populareco estis ankaŭ aktive puŝita de la ŝtata propagando. En tio oni jam povis observi la komencon de

[5] Ankaŭ la orient-okcident-germana aŭtoro Wolfgang Seiffert (komunisto, mort. 2009), kiu verkis afablan libron pri Rusio kaj Putin en 2000, skribis pri humiligo de Rusio ekzemple en la kazo de la NATO-bombado de Serbio en 1999, kio estis konsiderata kiel psikologia bato de la Okcidento kontraŭ Rusio. Tiu absurda sento de humiligita grandpotenco estas ridinda, sed la fenomeno ŝajnas esti karakteriza por slavaj kaj aliaj orienteŭropaj landoj kaj nacioj, kiu laŭdire estas klarigebla el ilia historio. La sama sinteno estas observebla ekzemple en la kazoj de Pollando sub Kaczyński aŭ de Hungario sub Orbán, kiuj sentas sin diktataj de Berlino kaj EU-Bruselo, kio povas kaŭzi reagon de agreso kontraŭ tiuj najbaroj, kun kiuj tiuj landoj kaj registaroj prefere pozitive kunlaboru anstataŭ batali kontraŭ ili.

la vojo de Ruslando denove al la aŭtokratiismo kaj diktaturo. La senskrupulaj manipuloj en la Putin-sistemo de la jaro 2011 (kiuj influis la supozeble falsitajn parlamentajn balotojn kaj precipe la kuriozan postenan interŝanĝon Medvedev-Putin) elĉerpis la paciencon de parto de la rusoj, ĉefe junaj generacioj, kaj kaŭzis publikajn amasprotestojn, kiujn la Putin-reĝimo iom post iom kruele sufokis. En 2012 Putin revenis al la potenco kiel ŝtatprezidento kaj senprokraste enkondukis pli drastajn leĝojn kaj metodojn kontraŭ la pro-testema, kritikema kaj opozicia publiko. Lia populareco dume falis kaj realtiĝis per la fraŭda aneksado de Krimeo en 2014, kiun multaj rusoj freneze festis kiel grandegan nacian sukceson kaj pri kiu ankoraŭ pli multaj mallaŭte ĝojis. Ju pli da tiaj "triumfoj" Putin povis prezenti al la rusoj, des pli kreskis lia populareco en Ruslando – sed ankaŭ la kritiko en eksterlando, precipe okcidenta, des pli ke post la aneksado de Krimeo sekvis milita aktiveco en la Donbaso kun la evidenta celo malstabiligi kaj detrui Ukrainion. Sed tiu ĉi aneksado ŝajnis esti lia plej lasta granda "heroeca" kaj glora ago, kiu trovis en Ruslando vastan aprobon, kvankam la ekstera diplomatia mondo ne akceptis ĝin, ĉar temis pri lezo de la internacia juro. Fariĝis evidente, ke la rusoj pli kaj pli fajfis pri la reagoj de la (okcidenta) eksterlando, kontraŭ kiu la putinisma propagandaĉo de la pasintaj 20 jaroj ŝajnis efiki ĉe vastaj sociaj tavoloj de Ruslando. Poste la lando komencis degeneri kaj stagni pli kaj pli en mallibereco kaj politika subpremado, kio estis akompanata de malboniĝo de la ekonomio sekve de okcidentaj sankcioj kaj bojkotoj kaj aliaj malfavoraj makroaj evoluoj, sed ĉefe ankaŭ pro la pli kaj pli subprema politiko en Rus-lando mem, kiu esence malhelpis la ekonomian kaj socian progreson.

En Okcidento oni estas konvinkita, ke sub realaj demokratiaj kondiĉoj, kiuj en Ruslando mankasas, Putin ne plu estus reelektita de la rusoj. Sed oni ofte forgesas, ke en Rusio, kiu havas alian politikan kulturon, kiu ne estas komparebla kun la reala liberalisma demokratio (kvankam Putin ruze kopiis ĝuste ĝiajn strukturojn por trompi la mondon kaj la rusojn mem), la politika logiko funkcias alimaniere. Unue la prezidento de Rusio havas laŭkonstitucie pli fortan pozicion ol en okcidenteŭropaj landoj, kio ofte kondukas al lia komparo kun la statuso de "caro". Krom tio oni ne subtaksu la daŭran popularecon de Putin en vastaj tavoloj de Rusio (kompare kun Gorbaĉov kaj Jelcin), kiu estas escepta fenomeno en la moderna historio de Ruslando. Ŝajnas, ke la rusoj pardonas al li ĉiujn fiagojn kaj krimojn "en la nomo de Rusio" (sed oni ne forgesu, ke en Ruslando Putin ne ests publike kritikebla). Krome oni devas konsideri la fortegan rolon kaj influon de la ŝtata propagando en Ruslando, kiu ĉiam ludis fortan rolon, ne gravas ĉu temas pri propagando komunisma aŭ kontraŭ-komunisma, ĉu porstalinisman aŭ kontraŭ-stalinisma, ĉu por-Gorbaĉova aŭ kontraŭ-Gorbaĉova, ĉu por-okcidenta kaj por-demokratio aŭ kontraŭ-okcidento kaj kontraŭ-demokratio, ktp. ktp. La rusoj ĝenerale subtenas, aŭ devas subteni, la aktualan politikon, kiu estas difinita en la Kremlo, pro kiu la rusoj ofte estas primokataj internacie kiel indiferentaj kaj obeemaj ŝafoj. Kvankam la rusoj ja forte atentas, kio okazas en Eŭropo aŭ Usono, ilin ĉefe interesas, ĉu ili vivas pli bone ekonomie, kompare kun la situacio dum militaj tempoj (precipe kiel dum la dua mondmilito) aŭ la komunisma periodo, kiam la vendejoj estis malplenaj. Se oni komprenis tion, oni komprenas ankaŭ, kial la rusoj malpli interesiĝas pri demokratio aŭ diktaturo (ĉar ili kutimiĝis al diktaturo, kun kiu ili faris eĉ pli bonajn spertojn ol kun kaosa demokratio). Oni devas konfesi, ke en la erao de Putin la rusoj vivis (almenaŭ en la unua duono) pli bone ol dum la malfrua tempo de Jelcin aŭ dum la tempo de Gorbaĉov. Ĉi tiujn esencajn aspektojn oni apenaŭ komprenas ekster Rusio. Pro tio la situacio povas esti misuzata de tia senkrupula krima bando kiel la Putin-kleptokrataro kaj -oligarkaro, kiu senhonte klarigas al la rusoj, ke ĝi ekzistas por servi favore al Ruslando, kvankam multaj anoj de tiuj grupoj mem grandskale prirabadis la landon por fariĝi miliarduloj, dum granda parto de la rusa popolo vivas en mizero kaj malriĉeco. En Okcidento oni miras kial la rusoj ne pli kritike rilatas al tiuj kontraŭdiroj.

Oni ankaŭ ofte diskutis pri la temo, ĉu demokratio en Ruslando entute estas ebla, enkondukebla kaj ĉu ĝi havas realan ŝancon stabile ekzisti kaj prosperi, aŭ ĉu ĝi ĉiam denove estas kondamnita fiaski. En la kazo de Putin oni devas konstati, ke li ne evidente aprezas la libe-

ralisman demokration, ĉar li kaj liaj samideanoj kredas, ke ĝi verŝajne endanĝerigus ilian potencon kaj la influon de la reganta klaso (kion estas evitinda). Por konservi la potencon de tiu politika klaso li devis kontraŭbatali kaj diskrediti la demokration, kvankam ĝi ankoraŭ ekzistas kiel formalaĵo, ŝajno, fasado kaj ludas cinikan rolon por trompi la elektantojn en Ruslando kaj la mondan publikon.

Sed necesas ankaŭ konsideri kelkajn specifajn cirkonstancojn, kiuj karakterizas la trajtojn de la nuntempa politiko kaj ties genezo en Ruslando. Tiuj estas ligitaj kun kelkaj malklaraĵoj kiel jenaj:

Ni ankoraŭ ne plene konas la tutan veron pri la instalado de Putin en 1999/2000 kiel nova gvidanto de Rusio, nome kiujn rolojn ludis en tio la iamaj fortoj ligitaj kun la iama KGB, kiuj regrupiĝis dum la 90aj jaroj, krom la unuopaj agantoj kiel Jelcin kaj kelkaj proksimuloj de lia "familio“ en la Kremlo, kiuj "elektis" Putin kiel posteulon de Jelcin, plus Boris Berezovskij, kiu rekomendis lin al la demisionta prezidento, dum la liberalaj reformistoj ĉirkaŭ Nemcov, Ĉubajs, Gajdar, Kudrin, Kasjanov k.a., estis malpreferataj. Ĉiuj rakontas en siaj memuaroj nature propran historon, kiu parte kongruas, parte devias. Estas konate, ke ankaŭ la oligarkoj Berezovskij, Abramoviĉ, Pugaĉov kaj la Jelcin-"familio" plus Jumaŝev kiel ĉefo de la prezidenta administracio, kiuj havis konsiderindan influon en la Kremlo, ludis iun rolon en tiuj decidoj. Pugaĉov, eble la plej malbone konata oligarko, fanfaronis, ke li havis la ideon, ke Jelcin demisiu anticipe kaj estu anstataŭita de Putin, kiu tiel povis fariĝi prezidento sen esti elektita. Neforgesinda estas la fakto, ke Sergej Kirienko, ĉefministro RF sub Jelcin en 1998 nomis Putin nova ĉefo de FSB. Kies marioneto la senkolora burŝeto Kirienko vere estis, estas malklare. Ankaŭ Jelcin prezentis en sia aŭtobiografio ("Meznokta taglibro") legendojn kaj rakontojn, pri kiuj oni ne certas, ĉu ili estas kredindaj aŭ nur fabeloj por nebuligi kaj kaŝi la verajn okazaĵojn. Same la respondoj de Putin notitaj en la libro "El unua fonto", kie li rakontis, ke li neniam interesiĝis pri politiko kaj ne estis interesita fariĝi prezidento de Rusio, sed obeis al Jelcin akcepti tiun funkcion, kiun li intencis plenumi nur du 4 jarojn, postlasas iom dubindan impreson. Dudek jarojn poste evidentiĝis, ke Putin sistemece mensogis, manipulis kaj falsis faktojn kaj kaŝis multajn gravajn informojn. Kaj la homojn, kiuj helpis al li akapari la potencon, li pli kaj pli ´forĵetis´, ĉefe tiujn, kiuj ne plu utilis al li. La altgrada malica naturo de Putin, kiu estas perfekta kopio de la ĉefrolaj gangsteroj en la James Bond-romanoj kaj -filmoj, estas unikaĵo, perpleksigis la tutan homaron kaj infektis tutan Ruslandon.

Lige kun tio, due, ni ne certas ĉu la (komence malalta) populareco de Putin en 1999/2000 estis aŭtenta aŭ ĉu ĝi estis artefarite kreita kaj puŝita alten fare de la Kremlaj propagandistoj kaj de la eks-KGB-uloj, kiuj celis instali taŭgan homon el la propraj vicoj kiel gvidanton de la ŝtato por regajni la potencon (kiun tiuj uloj grandparte perdis en la 1990aj jaroj). Kun la intenco regajni la povon cetere estis ligita la klopodo eviti, ke la komunistoj aŭ iuj realaj konkurentoj (kiel Lebedev, Primakov kaj Luĵkov) povu akapari la povon sur ŝtata nivelo, ĉar planoj de tiuj flankoj efektive ekzistis.

Kiel Garri Kasparov atentigis en sia libro (germanlingva eldono, p. 149) pri sia observo, en la nokto de la elekto de la 26a de marto 2000 la kvoto por Putin longe stagnis je la nivelo de ĉ. 47 procentoj kaj subite, ene de malpli ol 1 horo, saltis al 53 procentoj, kie ĝi restis ĝis la fino de la nombrado. Tiu ĉi (manipulo?) estis verŝajne klarigebla per la konsidero, ke dua elektorondo estintus embarasa kaj hontinda por Putin (kaj liaj propagandistoj), kiu estis anticipe elektita de la Kremlo por fariĝi nova prezidento (kvankam tia proceduro estas tute normala en demokratiaj sistemoj). Por eviti tiajn scenarojn en estonto la Kreml-propagando devis krei la "Putin-plimulton" (vd. sube), pli trafe dirite la Putin-diktaturon por sekurigi la daŭran potencon de la "silovikista" klaso en Ruslando. La posta radikaliĝo de la Putin-reĝimo estas esence klarigebla per tio, ke tiu klaso (esence temas pri KGB aŭ FSB aŭ kiel ajn oni nomu ĝin) timis perdi sian potencon (ekzemple en 2011-12 kaj denove ekde 2017). Putin devis servi kiel ĉefa protagonisto kaj "konstitucia“ garantianto de tiu reĝimo. Ĉar nek Putin nek iu ajn alia el sia

koterio iam publike parolis pri tiuj cirkonstancoj, kaj neniu (rusa ĵurnalisto) aŭdacis publike starigi tian demandon, kiu estis tabuita, la veraj intencoj kaj faktoj estas malklaraj kaj povis esti kaŝitaj ĝis nun. Kiel rezulto de la prezidenta elekto de marto 2000 estis oficiale proklamita la cifero 52,94% de la voĉoj por Putin. Ĉu tiu cifero do estas aŭtenta aŭ manipulita/falsita estas nekonate. Ĉiukaze la tuta ekzerco postlasis ambiguan impreson. Nu en Ruslando la popolo kutime elektas la kandidaton, kiun la Kremlo proponas, sen damandi, ĉu tiu kandidato estas en ordo, kaj la Kremlo faras ĉion, por ke tiu kandidato estu elektita. La ĉefa problemo de la rusa "demokratio“ (nomata ankaŭ "demokaturo“) estas, ke tia reganto kiel Putin ne povas esti malelektita de la popolo.

Por stabiligi la potencon de tiuj, kiuj instalis Putin en 1999 kiel posteulon de Jelcin, la propagando de la Kremlo kreis, kiel dirite, la tiel nomatan "Putin-plimulton", kiu iĝis esence ligita kun la politika partio "Unueca Rusio", kiu senkondiĉe apogas la politikon de Putin kaj funkcias kvazaŭ kiel reganta politika partio en Ruslando (kompareble kun KPSU). La novtipa partio, kiu estis fondita en decembro 2001 kiel unuiĝo de la frakcioj "Unueco" (de Ŝojgu) kaj "Patrio – tuta Rusio" (de Luĵkov/Ŝajmiev), unuigante membrojn, t.e. politikistojn kaj ŝtatajn oficistojn de diversaj politikaj pozicioj kaj konvinkoj, ne havas specialan ideologion, sed reprezentas ŝtatisman, naciisman, nacikonservativan kaj *putinisman* orientiĝon. La putinismo estas siaspeca persona ideologio de Putin, kiun li mem inventis kaj klopodas trudi al la rus(i)a socio, simile kiel la komunisma ideologio funkciis aŭ devis funkcii. Kvankam "Unueca Rusio" ŝajnigas, ke ĝi oficiale kaj formale agas sendepende de la Kremlo, la partio estas forte ligita kun la persono de Putin, kiu estas konsiderata kiel ĝia (neoficiala) gvidanto, kvankam li ne estas ĝia membro (sed en 2008-12 li ja estis ĝia prezidanto). La partio, kiu laŭ politikaj observantoj havas malbonan reputacion, plej malfrue post kiam Aleksej Navalni nomis ĝin „partio de friponoj kaj ŝtelistoj“, ne kritikas la Putin-sistemon nek prezidenton Putin mem kaj zorgas pri ĝia/lia daŭra tenado de la monopola potenco en Rusio. Sendepende de la demando, ĉu ĝi havas bonan aŭ malbonan reputacion, sendube ĝi estas *la partio de la Kremlo*. Kun la "Putin-plimulto" estas ligitaj ankaŭ sennombraj politike egalŝaltitaj "putinismaj" amasorganizaĵoj kaj movad(et)oj, kiuj ĉiam denove helpis al Putin venki en la balotoj. Ankaŭ la rus-ortodoksa eklezio, Moskva Patriarkio de Kirilo Ia, kiu benis la militon de Putin en Ukrainio, estante rekta komplico de la Kremlo, apartenas al tiu flanko. Krom ĉio tio ekzistas ankaŭ la t.n. "Tutrusia Popola Fronto" aŭ "Tutrusia Nacia Fronto", kiu estas koalicio de konglomeraĵo de ĉirkaŭ 2000 ŝtatismaj kaj naciismaj-konservativaj organizaĵoj kiel formo de blokpartia sistemo en Rusio. Ĝi estis oficiale establita fare de la rusia prezidento Vladimir Putin en majo 2011, kiu ekde junio 2013 mem gvidas la aliancon. Tiel la Kremlo ŝajnigas, ke la tuta (aŭ grandparto de la) ruslanda popolo unuece apogas la „nacian Gvidanton“ Putin, liajn sistemon kaj politikon. Probable tiel oni atingis (aŭ kreis) la kvoton de la 80-procenta apogo al Putin. Laŭ tio la restantaj pli malpli 20 procentoj do konsistigas publikon, kiu skeptike, kritike aŭ rifuze rilatas la Putin kaj ties reĝimo aŭ sistemo. Oni povas kompari la situacion kun la mal/aprobo de la glasnosto kaj perestrojko de la Gorbaĉova tempo. Dum ia minoritato ĉefe intelekta aprobis la reformojn, la granda amaso, inkluzive simplajn homojn/proletaron, ŝtatajn funkciulojn anojn de la KGB, armeo kaj "nomenklaturo", rilatis indiferente, pasive aŭ eĉ negative al ili, ĉar ili promesis la devon ŝanĝi malnova kutimojn kaj perdon de la povo de la komunisma partio, kiu ne pretis reformi sin mem. Do ĉirilate nenio nova en Ruslando. La opinio, ke sub Putin oni vivos pli bone, fine evidentiĝis kiel iluzio por la plimulto, kiu ne apartenis al la tavolo de la riĉuloj. La mallongan periodon de la (modesta) bonfarto komence de la jaroj 2000 artefarite kaŭzis la alta prezo de la nafto, per kiu la Putin-reĝimo financis la eksterlandajn importojn.

Kiel la sendependa "Levada"-centro en Moskvo, kiu faras sociologiajn enketojn, kalkulis, la reala averaĝa subteno al Putin kaj lia politiko estas ne pli ol ĉirkaŭ 60 anstataŭ 80 procentoj. Sed eĉ tiu ĉi kvoto sufiĉas por teni la "Putin-plimulton" kaj pravigi la legitimecon de la monopolisma Putin-regado en Ruslando, des pli ke aliaj politikaj partioj ludas malfortan rolon kaj

la veraj opoziciaj partioj kaj movadoj estis forpuŝitaj. Do oni devas baziĝi sur la supozo, ke efektive plimulto de la rus(land)a popolo apogas Putin kaj ties politikon, sendepende de la konsidero, ĉu la koncernaj ciferoj povus esti manipulitaj aŭ falsitaj. Post la komenco de la terura rusa milito kontraŭ Ukrainio en februaro 2022, la procentaĵo iom falis al 70, sed tio daŭre estis sufiĉe klara plimulto de al apogo al Putin. Tiuj kvotoj ebligas al Putin fari kion ajn li volas, ĉar li mem ĉiukaze baziĝas je la (iluzia aŭ reala) argumento, ke la plimulto de la ruslanda popolo subtenas lin kaj lian politikon kaj ke li agas en la nomo de la ruslanda popolo. Tiel pensas kaj argumentas ankaŭ la menciita estona ministro (kaj aliaj), sed en alia senco aŭ logiko, kiu permesas al li *kulpigi* la tutan rusan popolon pri la milito kontraŭ Ukrainio, dum Putin uzas tiun rusan popolon kiel *legitimilon*. La cirklo logike finiĝis, je ambaŭ flankoj, laŭ diversaj konkludoj. Eliro el la sakstrato aŭ kompromiso ne estas ebla. Unu el ili devus cedi.

Paralele al tiu evidenta altgrada ĝenerala populareco de Putin, li estis ĉiam denove konfirmita kiel prezidento de Rusio en regulaj laŭvicaj balotaj procezoj, kiuj estas antaŭvidataj de la konstitucio, kiel montras jenaj ciferoj: 52,94% en 2000, 71,31% en 2004, 64,35% en 2012 kaj 76,69% en 2018. Ĉar estas konate, ke balotoj kaj elektoj en Ruslando estas kutime manipulitaj kaj falsitaj, oni devas dubi pri la vereco de tiuj ciferoj, precipe tiu de la jaro 2018, kiu evidente respegulis la penojn kaj klopodojn de la Kremlo eviti la ripeton de la paneo de 2012, kiam Putin evidente travivis krizon de la populareco, kaj teni la povon de Putin. Laŭ la konstitucio li ne plu povis rekandidatiĝi, sed la konstitucio estis senskrupule ŝanĝita en popola referendumo, kiu finiĝis pozitive por longigi la oficdaŭron de Putin je pliaj 3x6 jaroj – kritikistoj parolis pri ŝtata puĉo kaj uzurpo de la potenco far la putinistoj.

Malgraŭ kronika malkontenteco pri la politika kaj ekonomia situacio en vastaj tavoloj, la plimulto de la rus(land)a popolo do ripete reelektis ĉiam denove Putin, dum tre aktivaj kaj popularaj opoziciuloj kiel Nemcov, Navalni, Jaŝin kaj (sufiĉe multaj) aliaj ricevis neniun realan ŝancon esti elektitaj por doni al la rusia politiko alian direkton, ĉar ili a) ne estis la kandidatoj de la Kremlo, b) nur relative malmultaj balotantoj voĉdonis por ili kaj c) la regantaj mastroj zorgis per diversaj manieroj kaj rimedoj, ke ili ne estu elektitaj. Tiel funkcias la "demokratio" en Ruslando, kiu estis kondukita al la absurdo per kruda forpuŝado de la opozicio. Eĉ okazis, ke iuj opoziciuloj, kiuj signifis esencan danĝeron por la regantaj mastroj, estis tragike eliminitaj el la politika trafiko de la Putin-reĝimo, ĉu per malpermeso, arestado kaj malliberigo, forpelo eksterlanden aŭ eĉ fizika likvido aŭ provo de fizika likvido. Multaj homoj en la tuta mondo supozas, ke Putin rekte aŭ malrekte ordonis tiujn eliminojn.

Tiel la ruslandanoj tragike falis en la kaptilon de Putin kaj lia bando, kiun iuj kritikaj aŭtoroj nomas mafio, kiu tre ruze kaj sukcese procedis laŭ malnovaj KGB-metodoj por akapari kaj defendi la povon en Rusio. La rus(i)a popolo kvazaŭ fariĝis ostaĝoj de sia propra politika sistemo, kiun ili reelektadis, rekonfirmadis kaj stabiligadis, kvankam sub la premo de la Kremlo, kiu evitis kaj malhelpis ĉiujn alternativojn.

Ĉi tiu longeta ekskurso kun provo klarigi la kreadon, funkciadon kaj rolon de la kvazaŭsankta Putin-sistemo kun la legendeca "Putin-plimulto“ kaj la ankoraŭ pli fama populareco de Putin, kiu donas al li kaj lia koterio la daŭran legitimecon regadi en Ruslando sen permesi alternativon, celis montri la dilemon, en kiu la ruslanda popolo hodiaŭ troviĝas. Ŝajnas, ke post du jardekoj da tre efika putinisma propagando la ruslanda popolo evidente ne plu povas dekroĉiĝi aŭ apartiĝi de tiu sistemo. Sed ĉu ĝi vere povas aŭ volus tion estas alia demando. Ekzistas duboj.

Se oni do volus reveni al la demando, ĉu la rus(land)a popolo portas kolektivan respondecon kaj kulpon pri la malfacila situacio, en kiu ĝi troviĝas kaj kiu kondukis al la rusa milito kontraŭ Ukrainio, oni devus resti objektiva kaj konsideri ĉiujn cirkonstancojn, aspekojn kaj facetojn supre menciitajn kaj traktitajn. La situacio resumiĝas jene: La plimulto de la rus(land)a popolo (parte libervole) subtenas Putin kaj ties politikon, sed sub la kondiĉoj de la aŭtokra-

tiismo kaj diktaturo en Ruslando ĝi troviĝas sub forta politika premo apogi lin kaj lian politikon, ĉar la ŝtata propagando forte influas la sintenon de la rus(land)a popolo, kiu ne havas alian politikan opcion, ĉar la Putin-reĝimo krude subpremas ĉiun politkan alternativon.

Nature oni povas argumenti kiel la menciita estona ministro kaj kulpigi la tutan rusan nacion. Sed tio estus kaj malĝuste kaj maljuste, ĉar kiel tuto la rus(land)a popolo staras sur forta politika premo kaj parto de la rus(land)a popolo ne subtenas la (milit-)politikon de Putin. Eĉ se grandparto de la ruslanda popolo aperanta en formo de la t.n. Putin-plimulto daŭre voĉdonas por Putin kaj apogas lian politikon, oni ne forgesu, ke ekzistas miloj, centmiloj, milionoj da rus-in-oj kaj rusianoj, kiuj ne aprobas la politikon de Putin ĝenerale kaj lian brutalan militon kontraŭ Ukrainio aparte. Oni devus ankaŭ esplori kaj scii, kiuj homoj elektas Putin kaj apogas lian politikon, kvankam estas konate, ke tiu apogo penetras ĉiujn tavolojn de la rusia socio kaj ampleksas ankaŭ la junularon, klerularon kaj religiajn homojn.

En tiu ĉi kunteksto leviĝus ankaŭ la demando, kiu en Ruslando estas la kulpulo kaj kiu estas la viktimo. Sed tio estas malnova demando, ĉar la popolo en Ruslando neniam estis politike libera (krom en la eraoj de Gorbaĉov kaj Jelcin) kaj do iusence estas viktimo (de jarcentoj). Ĉar la ruslanda popolo kutime apogis la politikon de la Kremlo, ĝi portis samtempe en principo ankaŭ iun politikan respondecon, kvankam ĉe tiu politika apogo la ruslanda popolo kutime troviĝis sur politika premo. Do ĉu sub tiaj cirkonstancoj entute eblas doni al popolo, kiu estas politike mallibera, la politikan respondecon kaj kulpon pri la decidoj kaj agoj de la politikaj gvidantoj, kiujn ĝi elektis, estis devigita elekti? Ekzistas fortaj duboj.

Kvankam en Ruslando ja ekzistas ĝenerala aŭ kolektiva interkonsento pri kelkaj socipolitikaj temoj sur kelkaj kampoj, kiuj principe devias de tiuj en Okcidento, ni ne scias kiel la 144-147 milionoj da loĝantoj (aŭ 108-110 milionoj da elekto-rajtigitoj, 2021) de Ruslando individue pensas pri tiu kaj jena temo, aŭ pri Putin kaj ties politiko. La kondiĉoj kaj cirkonstancoj de mallibereca politika kaj fermita socia sistemo aŭ kulturo malebligas ekscii tion, ĉar ampleksaj objektivaj kaj transparentaj enketoj kaj sondadoj ne povas esti publikigitaj en libere alirebla amas-komunikilaro. En tia sistemo oni povas fari nur privatajn enketojn inter relative malmultaj homoj kun la danĝero esti malkovrita, arestita kaj punita de la aŭtoritatoj, kiuj celas eviti tiajn enketojn.

Sed ni ne plu troviĝas en la carisma aŭ sovetia tempoj. En la moderna mondo venkis, malgraŭ la renaskiĝo kaj fortiĝo de ĉiuspecaj diktaturoj, la liberalisma demokratio. Eĉ se al la rusianoj oni do povus aŭ devus riproĉi (el liberalisma pozicio), ke per sia, ĉu pasiva aŭ aktiva, indiferenta kaj devigita balotkonduto ili kontribuis al la restarigo de la aŭtokratiisma kaj diktatureca ordo en sia lando, la provo doni al la rus(i)a popolo la *kolektivan respondecon* aŭ *kulpon* estus sensence aŭ senutile, pro kialoj jam menciitaj kaj ankoraŭ montrotaj. Kvankam por iuj politikistoj kiel la citita estona ministro tia solvo eble estus tre utila aŭ eĉ necesa. Kiel sciate la problemo de la kolektivaj respondeco, kulpo kaj puno estis diskutata siatempe lige kun la naziisma pasinteco de la germana popolo, sed kiel konate tiu diskuto finiĝis en la sakstrato.

La kolektiva respondec(ig)o aŭ kulp(ig)o de konkreta grupo kiel jura rimedo por puni ĝin por la agoj de unu aŭ pluraj el ĝiaj individuaj membroj kontraŭdiras la bazan sintenon de la klerigita eŭropa kultura tradicio (cetere same kiel la mortpuno), laŭ kiu ĉiu unuopa membro de la socio portas individuan respondecon pri siaj agoj. Ĉar la nocio de la kolektiva respondeco aŭ kulpigo ne kongruas kun la okcidenttipa demokrateca "jura ŝtato", ĝi estas nur limigite aplikata pro sia vageco kaj sekve ne ludas gravan rolon en la (okcidenta) jurisprudenco. Ĝi estas konsiderata kiel neadekvata puno pro ĝiaj diskriminaciaj sekvoj kontraŭ tuta grupo de homoj pro ĝeneraligita kulpigo pri la miskonduto de individuoj kaj tial kaj neakceptebla. Do neniu tribunalo, kiu estas devigita al tiu ĉi jura tradicio, prenus tian decidon. La kolektivaj kulpigo kaj punado estis praktikataj en la naziisma germana ŝtato kaj en stalinismaj sistemoj ekzemple en formo de familia kulpigo, kiam parencoj de kulpuloj povis esti respondecigitaj kaj senditaj

al koncentrejo. Nuntempe nur Israelo, Nordkoreio, Ĉeĉenio kaj eble ankoraŭ iuj aliaj landoj ankoraŭ praktikas la kolektivajn respondecigon, kulpigon kaj punadon.[6]

Kiel montrite la apliko de la kolektiva respondeco, kulpo kaj puno en kelkaj landoj unuavice koncernis/as familianojn de krimuloj. Do la apliko de la kolektiva respondeco, kulpo aŭ puno en la kazo de tutaj nacioj aŭ popoloj estas nerealisma, iluzia. Dum en Rusio oni ja povus respondecigi, kulpigi kaj puni individuoj, kiuj lezis aŭ ne respektis la validan leĝaron, la ideo respondecigi kaj kulpigi la tutan rus(i)an popolon estas senŝanca, senespera devojiga kaj servas precipe al politika polemiko kaj vekado de publikaj emocioj. Aliflanke ja eblus, utilus kaj necesus respondecigi individuojn por militkrimoj, se oni povas pruvi ilin al ili laŭ la ekzistantaj leĝoj kaj normoj de la internacia juro, ĉar la homaro (ne nur okcidenta), kiu sentas sin ligita al la UN-Ĉarto kaj la internacia juro, ne povas toleri militkrimojn.

Ankaŭ la eksa rusa diplomato Boris Bondarev, kiu proteste demisiis de sia posteno ĉe la rusia reprezentejo ĉe UN en Ĝenevo post la militatako de Rusio kontraŭ Ukrainio en februaro 2022, esprimiĝis en ĉi tiu senco. Laŭ li ne estas ĝuste kulpigi la tutan socion aŭ la tutan loĝantaron de la lando pro la milito kun Ukrainio. Ekzistas diferenco inter "kulpo" kaj "respondeco". Li kredas, ke oni kulpas nur pri siaj propraj agoj aŭ preterlasoj. Ekzistas specifaj individuoj por kulpigi pri ĉi tiu milito: tiuj kiuj faris la decidon, tiuj kiuj preparis ĝin kaj tiuj kiuj nun efektive mortigas homojn kaj faras militkrimojn. Tamen li konsentas, ke la socio portas moralan respondecon pri tio, kio okazas ene de ĝi. Tamen ĝi ne estas respondeca en jura senco kaj do ne estas punebla.[7]

Kiel apartan kazon oni devus konsideri la respondecon aŭ kulpon de multnombraj, fakte centoj aŭ miloj da rusaj ŝtataj funkciuloj, ekzemple sciencistoj, rektoroj, verkistoj, ĵurnalistoj, teatraj aktoroj, kulturagantoj, sportistoj ktp., kiuj subskribis la fifamajn kaj hontindajn Malfermajn Leterojn por subteni la rusan "militoperacon" kontraŭ Ukrainio. La demandon, ĉu ili subskribis ilin aŭtomate, libervole aŭ sub premo, necesus esplori en ĉiu unuopa kazo.

En ĉi tiu rilato necesas ankaŭ ne forgesi, ke la rusa agresmilito kontraŭ Ukrainio estas subtenata ankaŭ de la rus-ortodoksa eklezio, unuavice de la moskva patriarko Kirilo Ia (kiu estas iama KGB-agento) kaj de ties metropolitoj kaj episkopoj. Oni do povas konstati, ke praktike grandparto de la elito de Ruslando apogas la politikon de la Kremlo kaj ĝian agresmiliton kontraŭ Ukrainio. Okcidentaj observantoj kaj ĵurnalistoj tamen supozas, ke la milito de Putin inter elitanoj, oligarkoj kaj komcercistoj ne estas populara.

Do la neapliko de la kolektivaj respondeco, kulpo kaj puno tamen ne liberigus la rusianojn de ia politika aŭ morala respondeco. Kiel ĉiuj aliaj popoloj ankaŭ la rusoj kaj rusianoj devas mem porti la sekvojn de la politiko de la landaj politikistoj kaj elturniĝi el sia situacio. Ĉiu popolo respondecas mem por la politiko de sia registaro, sendepende de la cirkonstancoj, en kiuj tiu politiko estas farita, eĉ en diktaturo. Oni ne povas konstante voĉdoni por Putin kaj subteni lian politikon kaj poste diri, ke ĉio, kion li faris kaj faras, ne koncernas nin kaj ni ne respondecas pri tio, kion li faris. Sed la kazo de la rus(i)a popolo estas malfacila kaj kontraŭdira. En la kazo de la rus(i)a popolo temas pri popolo, kiu praktikas mikson de diversaj sintenoj, kiuj konsistas en samtempaj politika apogo de Putin, politika indiferenteco kaj rifuzo de la politika respondeco. Kiel en sovetiaj tempoj, la alta politiko estas rezervita al la centra gvida tavolo ĉirkaŭ la "caro" en la Kremlo, dum la civitanoj (fakte subuloj) ne rajtas enmik-

[6] La israela registaro permesas detruon de domoj de familioj de palestinaj teroristoj, dum judaj teroristoj ne estas koncernitaj de tia rimedo. En la Likud-partio oni diskutis eĉ pri la eblo „elimini“ familiajn membrojn de palestinaj teroristoj, kaj en 2002 la Supera Kortumo de Israelo donis verdan lumon por la deportado de familiaj membroj de teroristoj de la Okcidenta Jordanlando al la Gaza-strio. Homrajtaj organizaĵoj protestis kontraŭ tiaj rimedoj. En Nordkoreio validas ĝis nun la opinio, ke la tuta familio kulpas, se familiano estas kondamnita.

[7] Vd. https://www.swissinfo.ch/ger/politik/boris-bondarev--der-kreml-meint--die-schweiz-gehorche-den-befehlen-der-usa/47895772.

siĝi en la politikon, sed ili rajtas nur apogi kaj aprobi ĝiajn proponojn kaj rekomendojn, kiuj egalas al devigoj kaj ordonoj.

Tia(j) sinteno(j), en kiu(j) ankaŭ oportunismo ludas esencan rolon (ĉar la normalaj kaj /profesie/ aktivaj homoj devas iel vivi, funkcii kaj labori kaj elturniĝi en tia malfacila vivo kaj komplika sistemo), estas komprenebla. Aliflanke tia(j) sinteno(j) estas alt-grade problemplena(j) kaj danĝera)j), ĉar ili permesas al ajna agresema rusia registaro doni la verdan lumon ne nur por subpremi la propran popolon/socion, sed ankaŭ por gvidi militojn kontraŭ aliaj landoj, kio povas endanĝerigi la pacon en la regiono kaj malstabiligi la (fragilan) ekvilibron en la mondo entute (kion Putin probable celas por efektivigi sian revolucion). Ŝajnas, ke multaj simplaj kaj averaĝaj homoj en la grandega vasta Ruslando, kiuj vivas "normalan“ ĉiutagan vivon en silentaj provincaj urboj kaj foraj izolitaj vilaĝoj, eble la plimulto, eĉ ne konscias pri tio, ĉar ili ne estas koncernataj de la samaj problemoj, kiujn havas ekzemple opoziciaj aktivuloj, homrajtaj agantoj kaj politikaj nekonformistoj en la ĉefurboj, pri kiuj parolas preskaŭ la tuta (okcidenta) mondo, kaj ĉar en Ruslando oni ne diskutas pri tiuj problemoj publike.

Kiel senkulpiĝo la rusoj siavice verŝajne asertos, ke nur iu parto de la rusia popolo subtenis Putin kaj ke la politikan respondecon oni fordonis al la politikistoj, al kiuj oni fidis. Rusoj ĉiam trovas pretekston por pravigi sin, turnante la lancon en ĉiuj situacioj por defendi sin kaj sian "honoron".

Por ŝanĝi la situacion en Rusio necesus baze reformi la politikan sistemon kaj antaŭ ĉio evoluigi alian politikan kulturon, nome reale demokratian, en kiu ekzistus la eblo de la politikaj kontrolo kaj kunlaboro fare de la popolo rilate al la regantoj kiel tio estas kutimo en reale demokratiaj ŝtatsistemoj. Nature tia kontrolo eblus nur, se la kontrolanta instanco, do ekzemple la popolo, disponus pri pli da povo ol la kontrolitoj mem. Sed la postulo de pli da politika kontrolo estus esence ligita kun la postulo de pli da politika influo kaj ricevo de pli da informoj flanke de la elektantoj. Ekzemple en reprezenta demokratio (kiel en Germanio) la popolo transdonis la politikan respondecon al la parlamentaj popol-delegitoj, kiuj devas raporti al siaj elektantoj. Ktp.[8] Do la temo estas komplika kaj kompleksa kaj ne povas esti traktata ĉi tie. Putin verŝajne kredas, ke Rusio situas en reprezenta demokratio, en kiu la popolo transdonis la politikan respondecon al la parlamentaj popol-delegitoj kaj pere de tiuj al li mem aŭ eĉ rekte al li mem, ĉar la popolo rekte elektas la prezidenton). La realeco aspektas alie. La (ekstera) politiko en Ruslando estas farata kaj decidita de malgranda grupo de centraj funkciuloj de la Kremlo, kiuj vertikale donas siajn ordonojn al la subalternaj funkciuloj. Dum la rusia parlamento servas kiel konfirmanto de la volo kaj decidoj de la Kremlo (t.e. Putin), la "popolo" en Ruslando estas abstrakta amorfa amaso sen realaj politikaj rajtoj, kiu funkcias en balotoj nur kiel statistoj kaj por teni la Putin-plimulton (pri io alia Putin ne interesiĝas). Kun reala demokratio tio nature havas nenion komunan. Putin krude misuzis la demokratian sistemon, kiun li kondukis al la absurdo kaj finfine de facto abolis, ĉar ĝi nur ĝenas efektivigi liajn regadon, ideologion kaj planojn, kiujn li perforte trudas al la rusa popolo kaj aliaj popoloj per kruda subpremado de la civila libereco kaj milita agreso kontraŭ aliaj landoj.

Kiel ankaŭ Garri Kasparov opinias, la rusa popolo devas mem solvi la problemon kaj trovi vojon por liberigi sin de sia diktatoro.

Post la fino de Putin kaj lia diktaturo simple reveni al la antaŭa tempo – sed al kiu? –, kvazaŭ nenio okazis intertempe, estos malfacile, eĉ neeble. Pro siaj agoj Rusio probable restos izolita kaj kondamnita almenaŭ de parto de la homaro dum jaroj, eĉ jardekoj. Povas esti, ke iun tagon la rusoj sasertos, ke ili fariĝis viktimo de la demagogia propagando de Putin kaj estis perfiditaj kaj logitaj en la kaptilon de tiu ĉi ŝtatestro. Tio okazos, kiam Putin perdos sian

[8] Vd. ekzemple https://ub-deposit.fernuni-hagen.de/servlets/MCRFileNodeServlet/mir_derivate_00000058/Diss_Steiner_politische_Verantwortung_Funktionstraeger_2003.pdf, p. 11, 18.

honoron. Ion tion la rusoj jam asertis, kiam ili komencis liberiĝi de la komunismo, kiun ili adoradis kaj gloradis, aŭ devis adoradi kaj gloradi dum 70 jaroj.

Kiel dirite, certe estus, malgraŭ ĉio kaj pro la nomitaj kialoj, do malĝuste kaj maljuste respondecigi aŭ kulpigi la tutan rusian nacion pri la krimoj de la Putin-reĝimo, kvankam ĝi esence kontribuis al ĝiaj konstruado kaj daŭra funkciado. Ĝenerale la rusoj estas kontraŭ milito kaj por justeco kaj paco (laŭ tiuj principoj ili estis edukitaj dum la sovetia tempo – kvankam ankaŭ tio estis nura propagando). Kiel respondeculojn kaj kulpulojn antaŭ ĉio necesus enfokusigi, krom la konataj ĉefaj ŝtataj fukciuloj, la plej aktivajn publikajn subtenantojn kaj pledantojn de tiu ĉi reĝimo – kiuj cetere ekzistas en ĉiuj rusiaj partioj kaj sociaj tavoloj (same kiel ekzistas kontraŭuloj). Per la okcidentaj sankcioj (kiujn la rusoj kaj rusianoj stoike eltenas) oni ja konformas al tiu postulo aŭ deziro puni aŭ premi certajn protagonistojn de la Putin-reĝimo, kiuj kontribuas al la rus(i)a milito kontraŭ Ukrainio. Putin kaj lia bando kondutas kvazaŭ ili povus elteni ĉi tiujn sankciojn, kompreneble, kiel ĉiam, koste de la popolo, kiun tiu bando konsideras kaj traktas kiel misuzeblajn stultulojn aŭ danĝerajn ribelulojn kaj fine kiel t.n. kanonan nutraĵon en maljustaj militoj kontraŭ aliaj landoj.

Anstataŭ konsideri kolektivan kulpigon aŭ punon povus esti pli utile kaj saĝe paroli pri la neceso de *mempuriĝo* de la rusia aŭ rusa popolo aŭ socio, kiu post iom da tempo, kiel en la kazo la germanoj post la dua mondmilito, kiuj devis liberiĝi de la naziismo, povus konduki al la nacia savo. Kompreneble tio ne signifus mempuriĝon, pri kiu cinike parolis Putin, kiu celas reeduki sian popolon al fidelaj sekvantoj de lia naciisma movado, kiel jam la komunistoj sensukcese provis fari. La rusoj reagus verŝajne indiferente al tiaj klopodoj (kvankam ili kunludas en la politiko kiel supre priskribite), kiuj havas nenion komunan kun la realeco de la vivo. Temus pri mempuriĝo en alia senco, nome pri *mempuriĝo de la putinismo*, sed tio signifus, ke la rusoj kaj rusianoj unue devus forlasi la eraran kaj kriman Putin-reĝimon. Ŝajnas, ke tio eblus nur post kiam tiu reĝimo estos faligita de sia piedestalo. Tamen tiu procezo povus esti fatale prokrastata, se eĉ pli radikalaj elementoj akaparus la potencon en la Kremlo, kio estas en principo tute imagebla, ĉar tiaj elementoj publike anoncis sin kaj do reale ekzistas. Ili povus aŭ nuligi aŭ reformi la Putinan sistemon, sed kia sistemo tiam konkrete sekvus kaj ĉu ĝi estus pli bona, estas tute malklara demando; realaj alternativoj dume ne videblas. Sen ŝanĝo de la pensmaniero de la rusiaj gvidantoj la nuna politika kurso de Rusio ne ŝanĝiĝos, kaj tiu pensmaniero ne ŝanĝiĝos tiel longe kiel Putin okupas la povon (Brian Carlson). Alia grava demando estas, ĉu la novaj gvidantoj ĉesigus la militon kontraŭ Ukrainio aŭ ĉu ili daŭrigus ĝin. Sed ĉu en nova postputina historia fazo la volo, (mal)forto kaj fiero de la rusoj entute permesus sukcesan procezon de tia mempuriĝo en la "germana" senco (la prezo ĉe la germanoj estis, ke ili perdis parton de sia nacia fiero) estas denove alia demando. Skeptiko ekzistas. Oni devas ankaŭ konscii, en kiu historia fazo aŭ stato la rus(i)a popolo situas nuntempe – post 70 jaroj da kruda bolŝevismo-stalinismo (kun teruraj militoj en 1918-21 kaj 1941-45), unu jardeko da sovaĝaj kaj kaosaj 1990aj jaroj (malgraŭ demokratio) kaj 23 jaroj da subprema Putin-reĝimo. Tio signifas 106-jaran seninterrompan katastrofon, kiu psike kaj fizike elĉerpis la popolon! Pri la mallibereco kaj subpremado, kiuj daŭris dum jarcentoj en la carisma tempo, ni tute ne parolu. Iuj observantoj komparas la nuntempan fazon de Ruslando kun la hitlera tempo de la 1920-30 jaroj, kiam la nazioj ribelis kontraŭ la decidoj de la Versajla pactraktato. Nun Putin ŝajne ribelas kontraŭ la historiaj decidoj ĉirkaŭ la fino de la Orienta Bloko kaj Sovetunio de 1989-91, kies legitimecon li pridubas kaj kiujn li celas venĝi.

Legante la karakterizon verkitan de Thomas Grimm de la tempo, kiam Hitlero estis akaparonta la povon, oni efektive povus iusence kompari la situacion de Rusio, kiam Putin transprenis la povon fine de la 90aj jaroj, kun la tiama situacio en Germanio:

„La ascendo de Hitlero kaj lia efiko al la amasoj estas klarigeblaj grandparte per la vivkondiĉoj de la germana loĝantaro ekde la eksplodo de la tutmonda ekonomia krizo en 1929. La malriĉiĝo de larĝaj laboristaj tavoloj, ruinigitaj mezgrandaj entreprenistoj kaj partoj de la

burĝaro plagita de ekzistozorgoj alportis al li pli kaj pli da subteno. En 1932 ekzistis 6 milionoj da senlaboruloj en Germanio. La deprimata baza etoso estis sentebla en la tuta loĝantaro. La demokratiaj fortoj de la Vajmara Respubliko ne povis solvi la socian kaoson. La registaroj ŝanĝiĝis pli kaj pli rapide, kaj la plimulto de germanoj havis nur unu deziron: finfine estu reguligitaj kondiĉoj. Konstruata sur la efiko de simplaj sloganoj, la NSDAP- propagando aperigis afiŝon, sur kiu sub amaso da malgrasaj figuroj estis skribita jena frazo: "Hitlero, nia plej lasta espero!" Fakte Hitlero promesas ordon kaj stabilecon. Li ŝajnigis prizorgi la bezonojn de la homoj. Ankaŭ en Rusio Putin aperis kiel plej lasta espero, kiu promesas ordon kaj stabilecon kaj ŝajnigis prizorgi la bezonojn de la homoj.

Kaj la 24a de februaro 2022, kiam Putin atakis Ukrainion, povus estis komparita kun la 1a de septembro 1939, kiam Hitlero atakis Pollandon. Ĉu kiel enkonduko al la Tria Mondmilito? La historio evidente iel ripetiĝas.

Do, unue, konante la longan kruelan kaj sangan historion de Ruslando, en kiu momentoj de libereco kaj demokratio ege raris kaj mankis, oni povas nur malfacile kredi aŭ imagi, ke Ruslando transformiĝos de unu tago al la alia al libereca kaj demokratia ŝtato aŭ civilizo. Kun tia perspektivo kaj sub tiaj kondiĉoj Rusio verŝajne ankaŭ ne ĉesos fariĝi altgrade agresema kaj danĝerega lando. Ĉu entute eblos bridi ĝin estas tute alia demando.

Due, la ´civilizita´ mondo devas zorgi pri tio, ke Rusio ne fariĝos ankoraŭ pli agresema, pli radikala, pli sovaĝa kaj do pli danĝera, kaj devas eviti, ke fine ĝi ĵetos atombombojn kontraŭ aliaj landoj, ĉar tiu risko ŝajne ne estas ekskludebla. Pro tio estus grave se Putin malaperus, se Ruslando povus trovi sian pacon kaj fariĝos ´normala´ lando.

La procezo de la menciita mempuriĝo ankaŭ devus esti akompanata de serioza prilaborado de la historia pasinteco (preodolenie proŝlogo). Pesimisma rigardo al la aferoj restas. Multaj rusoj kaj rusianoj subtenas la ideon, kun aŭ sen Putin, "restarigi" la "iaman" grandpotencon ruslandan, la Ruslandan Imperion, kiel ĝi ekzistis ĝis 1918, aŭ en la limoj de Sovetunio de 1989. Al tiu nova "Ruslando“ devus aparteni ankaŭ Ukrainio, Belorusio, Moldavio, eble la Baltaj Landoj kaj parto de Pollando, inkluzive la transkaŭkazajn kaj mezaziajn respublikojn, almenaŭ kiel influa aŭ bufra zono. Tia scencaro devas esti nepre evitata. La rusoj finfine ĉesu lanĉi militojn por sanktigi tiun celon kaj lasu tiujn landojn kaj popolojn, kiuj ne plu volas aparteni al Ruslando, en paco.

### Sanstato de Putin kaj Rusio post Putin

Ŝajnas, ke la milito daŭros tiel longe kiel Putin havas la potenon en Rusio. Tiu longeco ŝajne dependas ankaŭ de la vivo kaj sano de Putin. Pluraj ekspertoj kaj observantoj esprimiĝis kritike pri la sanstato de Putin.

Brian Carlson, estro de la "Tutmonda Sekureca Teamo" ĉe la pensfabriko "Centro por Sekurecaj Studoj", diris en aŭgusto al la svisa ĵurnalo *Blick*: Putin estas preskaŭ 70-jara kaj lia sanstato ŝajne estas malbona. Tamen estas neklare kiom grava estas lia malsano, ĉar oni simple ne scias precize, kiun malsanon Putin suferas. Ekzistas raportoj, ke Putin havas kanceron kaj trapasas specialan kemioterapion. Kelkaj fotoj kaj filmoj, en kiuj Putin aperis en la publikeco, fakte postlasis la impreson de malsana viro. Laŭ ies imagoj li eble jam mortis, dum duobluloj daŭrigas lian ludon.

Kyrylo Budanov, estro de la sekreta servo de Ukrainio SBU, diris fine de junio, ke ukrainaj spionoj estis enplantitaj en la Kremlon kaj ke ili estas informitaj pri la sanstato de Putin. Laŭ ili la Kreml-estro estas "grave malsana" kaj ne havas longan vivon antaŭ si.

Aliflanke, Tony Radakin, estro de la brita armeo, kontestis la version, ke Putin estas fizike malbonfarta. Kaj en junio la rusia ministro pri eksterlandaj aferoj Sergej Lavrov ankaŭ neis la aserton, ke Putin estas malsana. Estas klare, ke tiu rusia ministro povis anonci nenion alian.

Valery Solovey, iama profesoro ĉe la Moskva Instituto pri Internaciaj Rilatoj, tamen diris en rusa radio-intervjuo fine de septembro 2022: „Rilate lian sanon, ĝi plimalboniĝas, jes, draste, draste.“

John Sweeney, aŭtoro de la libro "La murdisto en la Kremlo", ankaŭ suspektas, ke Putin havas kanceron kaj dependas de medikamentoj, prenante steroidojn. La drogoj povus klarigi lian altigitan agresemon. Tamen la preciza tipo de kancero ne estas konata. Oni parolis pri kancero de la tiroidoj aŭ de la pankreato ĝis la Parkinsona malsano, kaj pri operacio en majo.

Sed ĉiuj asertoj kaj supozoj pri malsano, duobluloj kaj jama forpaso de Putin verŝajne apartenas al la regno de la fantazioj.

Pri la estonteco de Rusio, Sergej Gurev, rusa ekonomikisto kaj iama konsilisto de la Kremlo, opinias, ke post la morto de Putin la antaŭa politika sistemo povus kolapsi kaj Rusio povus alpreni tute novan formon, kiel li diris al CNBC. Tamen estas ege malfacile antaŭdiri ĝuste kio okazos. Reĝimoj kiel la nuna en Rusio povus ŝanĝiĝi en tre neantaŭvideblaj manieroj. Putin starigis sian reĝimon tiel, ke neniu povas anstataŭi lin kaj la sistemo ne povas funkcii sen li. Estas imageble, ke komence de nova oficperiodo „iu speco de ultranaciisma ulo“ aŭ „armea ĥunto“ povus transpreni la sceptron, sed ankaŭ povus okazi, ke iu, „kiu volas rekon-strui la ekonomion, turnas sin al la Okcidento“.

Kvankam ŝajnas, ke Putin ankoraŭ vivas, eble havus sencon ne ekskludi la scenaron pri mem-mortigo – aŭ mortigo de Putin. Kaj la unua kaj la alia kazoj havas tradicion en la cirkloj de la potenco de Ruslando. Se, kiel Hitlero, kies agmodelon li povus imiti, Putin mortigus sin per kuglo, veneno aŭ io ajn alia, ĉar li ne plu trovis eliron el sia senespera situacio, tio povus sig-nifi la finon de Putina Rusio, kiu estus komparebla kun la fino de la Tria Regno, ĉar ankaŭ Rusio perdis militon – en Ukrainio. Post 1917 kaj 1991 tio estus la tria kolapso de Rusio en pli ol unu jarcento. Subtenata de pli akra ekonomia kaj armea krizo (pro efikoj de la sankcioj kaj aliaj kialoj), tia scenaro povus okazi en 2022 aŭ 2023. La kondiĉo verŝajne ankaŭ devus esti, ke la Putina elito kaj ĝiaj sekurecaj taĉmentoj devus ŝanĝi la flankon, se tiuj homoj kom-prenis, ke la sistemo kolapsas kaj disfalas. Kiel alternativo estus imagebla, kiel dirite, trans-preno de la potenco fare de radikalaj aŭ moderaj Putinistoj, kiuj aŭ intencas daŭrigi la antaŭan (agreseman) kurson (kontraŭ la Okcidento) aŭ ĉesigi la barbaran militon kontraŭ Ukrainio, ĉar ĝi devus esti konsiderita kiel pli malpli perdita. Dum la unua scenaro kompreneble ne estus en la inte-reso de la Okcidento kaj de la monda paco, la dua povus kvietigi la situacion. Se Putin eltenos la militon kaj restos sana, ekzistas ŝanco, ke li konservos la povon kaj restos prezi-dento aŭ gvidanto de Rusio por la resto de sia vivo. Ĉu li ĉesigus la militon aŭ eĉ ankoraŭ vastigus ĝin, kio ne estas ekskludebla, provokante Trian Mondmiliton kun la uzado de nukleaj armiloj, ne estas konate hodiaŭ. En ĉi-lasta kazo la monda politiko devus zorgi pri tio, ke Putin estu forigita de la potenco, ĉar tia mondmilito povus signifi la finon de la homaro. Oni povas nur esperi, ke Putin konscias pri la konsekvencoj, kiujn la apliko de nukleaj armiloj havus por Ruslando, ĉar la Okcidento certe ne restus pasiva.

Kiel ajn la sanstato de Putin estas taksebla kaj kio okazos post lia morto, la internacia komu-numo verŝajne devos elteni morale, psike, politike, socie kaj ekonomie elĉerpitan kaj ruini-gitan kaj daŭre agreseman Rusion por longa tempo. Kiel trafe diris la svisa federacia prezi-dento Ignazio Cassis (2022): „Rusio ne malaperos de la mapo. Sed Rusio fariĝos eĉ pli dan-ĝera, se ĝi alianciĝos kun aliaj krimaj reĝimoj pro pasio kaj venĝo kontraŭ la Okcidento. Ĉi tiu danĝero ne estu subtaksata.“ Pro tio estas ege grave, ke Ukrainio estas defendata, helpe de la okcidentaj landoj, por eviti, ke Putin atakos aliajn landojn en la orienteŭropa regiono.

Simple likvidi la kremlestron (kiel ekzemple Osama Bin Laden), kiu evidentiĝis kiel rusa gangstero kaj krimulo, oni ne povas, ĉar finfine li ankoraŭ estas la ŝtatestro de Ruslando.

A.K.

Esperantigo surbaze de la germanlingva originalo publikigita sur www.osteuropa.ch, aŭgusto 2022.
(Rimarko: La situacio ĉirkaŭ la milito esence ŝanĝiĝis, kiam la 21an de septembro 2022 Putin ordonis partan mobilizadon de la rusia armeo, kiu trafis sennnombrajn rusajn virojn, kiuj ricevis la "inviton" por iri militi al Ukrainio, kaj kiam Rusio dekretis la aneksadon de kvar ukrainaj teritorioj komence de oktobro.)

(Prilaborita kaj kompletigita) esperantigo surbaze de la germanlingva originalo publikigita sur www.osteuropa.ch, aŭgusto 2022 (stato de la aktualeco) A.K.

© www.planlingvoj.ch, oktobro 2022.

* * *

Fine de septembro / komence de oktobro 2022 (daŭrigo):

## Aneksado de fremda teritorio laŭ rusa maniero

### Kiel Rusio kutimas procedi en la preparado de la aneksado de militkonkerita eksterlanda ŝtatteritorio kaj kiel la terrabo estas formale pravigita

La fraŭda aneksado de la kvar ukrainaj regionoj Donecko, Lugansko/Luhansko, Zaporiĵo kaj Ĥerso-no, efektivigita de Moskvo en senskrupula kaj fulmrapida procedo, estas la plej nova elstara ĉefverko de la krimaj enmiksiĝo kaj konkerpraktiko de la moskvaj regantoj en Ukrainio, kiu daŭras de jaroj, ĉar ili celas likvidi Ukrainion en sia antaŭa formo. Jam en 2014 Ruslando pruvis tiun praktikon per la kontraŭleĝa aneksado de Krimeo kaj nun uzis kaj ripetis ĝin denove en la fraŭda alproprigo de kvar orientaj kaj sudaj ukrainaj teritorioj. Post la milita konkero de ĉi tiuj areoj fare de la rusia armeo en februaro/marto 2022 ili estis proklamitaj kiel sendependaj teritorioj en unua paŝo al la aneksado de prezidento Putin en ago kontraŭa al la internacia juro. La du memproklamitaj "Popolaj Respublikoj" Donecko kaj Lugansko/Luhansko en la Donecka Baseno (Donbaso) estis agnoskitaj kiel sendependaj ŝtataj formaĵoj fare de Putin la 21an de februaro 2022, kelkajn tagojn antaŭ la komenco de la "speciala milita operaco". Jam la 15an de februaro la Ŝtata Dumao RF postulis, ke ĉi tiuj du areoj estu agnoskitaj kiel "sendependaj respublikoj". Ĉi tion antaŭis konforma alvoko de la porrusiaj separistoj en Donbaso en orienta Ukrainio. Unu tagon poste, la 22an de februaro, la Ŝtata Dumao ratifis la "sendependecon" de la "Popolrespublikoj" Donecko kaj Luhansko. La 30an de septembro Putin proklamis la sendependecon de la ukrainaj regionoj Ĥersono kaj Zaporiĵo, kvankam ili ne estas tute kontrolataj de la rusia armeo.

Ĉe Putin kaj liaj militĉefoj verŝajne eksplodis paniko, kiam ili konstatis, ke la sukcesa kontraŭ-ofensivo de la ukraina armeo rapide regajnas vastan terenon en la Ĥarkiva regiono kaj prepariĝas por daŭrigi la rekonkeron de pliaj ruse okupataj areoj de la ukraina Donbaso. La ukrainoj lerte eluzis la vakuon kreitan dum ŝajna malforta fazo de la rusa invado kaj en la tagoj de la parta milit-mobilizado en Rusio. Sur la rusa flanko oni devis rapide agi por eviti plian perdon de ruse okupata teritorio. Tiu rusa agadbezono kondukis al la – tute kon-traŭleĝa

– sendependec-proklamo de la du okupataj regionoj Zaporiĵo kaj Ĥersono, al la sek-vaj kontraŭleĝaj referendumoj kaj fine al la same kontraŭleĝa aneksado de la kvar orientaj kaj sudaj ukrainaj areoj por povi defendi ilin pli efike kiel rusan ŝtatan teritorion.

De la 23a ĝis la 27a de septembro okazis ŝajnreferendumoj en la kvar menciitaj regionoj, kiuj estis deklaritaj kontraŭleĝaj kaj ne rekonitaj de la UN-komunumo kaj de Ukrainio mem. La demokratiaj kaj konstituciaj antaŭkondiĉoj por tiaj referendumoj, kiuj okazis dum milito, ne ekzistis, nek troviĝis surloke oficialaj elekto-observantoj, tiel ke oni ne povis sendepende kontroli la – tute netravideblan – disvolviĝon de la referendumoj kaj iliajn rezultojn. Estis raportite, ke multaj "balot-rajtigitoj" en la koncernaj lokoj estis vizititaj en siaj loĝejoj de moviĝantaj balotteamoj kun balotujoj, kiuj estis akompanitaj de armitaj soldatoj. Ŝajnas, ke la balotejoj estis malfermitaj nur dum unu tago.

Fine la rezultoj estis publike anoncitaj. En la Donecka "Popolrespubliko" la "aprobo" de "98.27%" por la aneksado estis anoncita jam kvar horojn antaŭ la oficiala fermo de la balo-tejoj. Respektive "97.63%" kaj "98.19%" da aprobo estis rikoltitaj en la sudukrainaj regionoj Ĥersono kaj Zaporiĵo. Tiaj groteskaj, sovetiecaj kaj tute nekredindaj pintaj ciferoj estigis la suspekton, ke temas pri falsitaj rezultoj, kiuj estis verŝajne anticipe fiksitaj aŭ formiĝis en ĉirkaŭaĵo, en kiu apenaŭ iu voĉdonis kontraŭ la aneksado. Dum Rusio asertis, ke la referendumoj estis okazigitaj laŭ la normoj de la internacia juro, Kievo deklaris la referendumojn "simple malvalidaj". La 28an de septembro la Donbas-separistoj petis al Putin aneksadi la referendumajn areojn. La 29an Putin rekonis la regionojn Ĥersono kaj Zaporiĵo sendependaj teritorioj kontraŭe al la internacia juro. La 30an en solena ceremonio en la Kremlo kaj en ĉeesto de la aplaŭdanta politika elito kaj de la estroj de la kvar separismaj regionoj, Putin subskribis la aneksajn dokumentojn, elpaŝante kun nova nekutime polemika filipiko kontraŭ la Okcidento, en kiu li ankaŭ memorigis, ke la usonanoj ĵetis atombombojn sur Hiroŝimon kaj Nagasaki. Ili faris tion por devigi Japanion militkapitulaci. Ĉu Putin celis diri, ke li eble pripensos fari la samon en la kazo de Ukrainio?

La 2an de oktobro la Konstitucia Kortumo de Rusio okupiĝis pri la aneksado de kvar ukrainaj teritorioj, trovante neniun lezon de la rusia leĝaro. Sekve la 3an de oktobro la aneksado de la okupitaj ukrainaj teritorioj estis ratifita de la Ŝtata Dumao RF, kaj konforma leĝo pri la integ-riĝo de la okupitaj teritorioj estis adoptita. La 4an de oktobro ankaŭ la Federacia Konsilio RF aprobis la aneksadon sen kontraŭvoĉoj, malgraŭ neklaraj teritoriaj limoj – la sola senatano, kiu kuraĝe atentigis pri tio antaŭ la voĉdono, estis la "eterna kverelemulino" Ljudmila Naru-sova (vidvino de Anatolij Sobĉak). Malgraŭ certaj kritikaj fendoj en la supraĵe politike homo-gena socio, kiuj malfermiĝis en la pasintaj tagoj, la tuta publike pre-zentita Kremla elito apo-gas la politikon de Putin formale je 100%. La rusia potencelito volas ĉiukaze eviti la impre-son, ke en la rusia politiko ekzistas eĉ plej etaj duboj pri la ĝusteco kaj praveco de la aneksado de la ukrainaj teritorioj. La kontraŭleĝa aneksado formale finiĝis la 5an de oktobro per la subskribo de koncerna aneksa leĝo fare de prezidento Putin. La kruda rusia lezo de la inter-nacia juro do estis oficiale sigelita per ĉi tiu dekreto. La 2an de novembro en Moskvo okazis flaga ceremonio por solene akcepti la kvar aneksitajn ukrainajn teritoriojn en la sinon de la Federacia Konsilio de RF. La senfinaj provokoj de Moskvo certe ne estas finitaj.

La aneksado de fremda ukraina ŝtatteritorio farita de Rusio kiel priskribite estas nova aro-ganta, krima kaj kontraŭleĝa ago de Rusio, kiu kontribuas al la daŭrigo de la milito en Ukrai-nio. Ĝi ne povas esti akceptita aŭ tolerita en ajna formo de Ukrainio kaj de la internacia ko-munumo. La respondeculoj de tiu ĉi fraŭda aneksado, kiu estas nenio alia ol kruda terrabado de eksterlanda ŝtatteritorio, devas esti persekutitaj, akuzitaj kaj submetitaj al tribunala pro-ceso kaj, se eble, severe punitaj. La plej aktuala rusia ŝmira teatro estas ekzemplo por ilustri kiel Moskvo procedas, konkerante fremdan teritorion. La sama procedo povas esti ripetita iam ajn en la kazo de aliaj teritorioj kaptitaj de la rusia armeo.

Krome, ĉi tiuj referenduma farso kaj teritoria aneksado, kiel ili estis stiritaj kaj enscenigitaj de Putin, devas esti rigardataj kiel nova hontinda kaj cinika provoko de la rusiaj gvidantoj, kiu celas montri al la Okcidento ilian plenan abomenon pri la demokratiaj, juraj proceduroj, kiel ili estas kutimaj en Eŭropo. La celkonscia intenco de Putin estas malkaŝi kaj senkreditigi la normojn de la demokratio, jura ŝtateco kaj internacia juro, kiel ili estas praktikataj de la okcidentaj landoj, kiel "hipokritecon" kaj "duoblajn normojn", sabotadi ilin per propra dubinda interpreto, inversigi ilian signifon kaj konduki ilin al absurdo.

La tuta teoria kaj retorika repertuaro de la sabotado, subfosado kaj ruinigo de la ideologia kaj geostrategia malamiko, kiun tiu murdema kaj venĝema KGB-eksdungito, kiu prezidas Rusion, iam lernis kiel sian profesian metion, nun plene eksplodis ĉe li kaj fariĝis vivanta praktiko. Konsiderante la teruran malamon, kiun tiu postsovetia rusa naciisto praktikas kontraŭ la Okcidento, oni ne plu dubas, ke mense li estas matura kaj preta pafi kaj ĵeti ABK-armilojn en kazo de neceso. Li konstante parolas pri tio de jaroj kaj minacas per ĝi la tutan mondon. Pri la danĝero de la bagateligo kaj subtaksado de la seriozeco de liaj ideoj, intencoj kaj planoj oni devas urĝe averti. Espereble Ŝojgu kaj Gerasimov, la du aliaj armeaj ĉefoj por premi la nuklean butonon, kapablas kaj pretas malhelpi ĉi tiun scenaron, se Putin ordonos ĝin. Tia malnobla sinteno nur pli izolos internacie Ruslandon mem, kiu riskas fariĝi paria ŝtato. Eĉ Pekino kaj Nov-Delhio ne plu subtenos ĝin, kaj la Okcidento jam anoncis novajn sankciojn. La germana ministrino pri eksterlandaj aferoj Annalena Baerbock tute pravas, se ŝi diris, ke Putin estas simbolo de la „teroro kaj mallibereco“.

La moskva Kreml-bando devas esti haltigita antaŭ ol ĝi aranĝos pli da malbono kaj surtera ĥaoso. Tiu ĉi bando estas pli terura ol la sovetiaj komunistoj (nature kun la escepto de Stalin kaj lia bando) aŭ la itala mafio, kiuj reprezentis (kiel katolikoj) iun moralon, Malgraŭ altgrada krimeco tiuj bandoj ŝajnis havi ion bonan en la kerno (kiel la membroj de tiuj bandoj mem kredis). Al la Putin-bando mankas ajna pozitiva moralo, ĉar en la idearo kaj sinteno de tiuj homoj oni povas malkovri nur negativajn, reakciajn, detruajn kaj egoismajn motivojn. Tiu bando konsistas esence el purrasaj (modernaj) gangsteroj kaj krimuloj, politikaj kaj ekonomiaj, edukitaj en la spirito de la KGB kaj de la sovetia kaj rusa mafio.

Historie kaj tipologie la Putin-bando, konsistanta esence el iamaj KGB-anoj kaj postsovetiaj komercistoj, kreis novtipan hibridan formon de postsovetia reĝimo kun faŝismaj kaj grandrusaj imperiismaj trajtoj, kvankam ĝi ne estas komparebla kun la germanaj kaj aŭstraj nacisocialistoj de Hitlero, sed eble kun diversaj ĉefe politike dekstremaj reĝimoj kaj diktaturoj de "kanajlaj" ŝtatoj de Latinameriko. En tio la Putin-reĝimo sendube uzas tradiciojn de la sovetia ŝtato. Tiuj bandoj, kiuj uzurpis la potencon en la ŝtato, utiligas politikajn demokratiajn rimedojn por esti elektitaj de la popolo al la potenco, sed fakte temas pri klasikaj diktaturoj. Ili ĉiuj revas pri la pereo de la Okcidento, kies avantaĝojn ili ekspluatis kaj kiun ili konsideras kiel rivalon, komercan konkurenton kaj ideologian malamikon (post kiam ĝi "helpis"al ili evolui kaj progresi) kaj minacas per nukleaj armiloj. Precipe ĝiajn valorojn de la demokratio, jura ŝtateco kaj libereco, kiuj estas dorno en iliaj okuloj, ili celas detrui kaj forigi por ŝanĝi la mondordon kaj enkonduki la proprajn regulojn. Eblas aserti, ke en tiuj ŝtatoj esence temas pri unuopaj krimaj bandoj, kiuj misuzas sian potencon por egoismaj celoj kaj protekti sian mafiecan membraron, dum ili grandstile subpremas la senrajtajn popolojn, kiujn ili krude regas per metodoj de ĉantaĝo, polica perforto kaj politika subpremado kaj jura trompado kaj manipulado, sed kiujn ili ankaŭ timas kaj abomenas kiel potencialajn ribelantojn kaj protestantojn. Kiel montriĝis la ekzempoj de Ĉeĉenio, Kartvelio kaj Ukrainio, ili ne hezitas lanĉi krudajn terorismajn militojn kontraŭ la koncernaj najbaraj popoloj, kiuj formis sendependajn ŝtatojn, sed pri kiuj tiuj rusaj bandoj asertas, ke ili apartenas al la „rusa mondo“. Tiuj landaj bandoj estas internacie aliancitaj kaj bone interkonektitaj, se oni rigardas la akson Rusio-Irano-Ĉinio (al kiu aliĝas multaj pli malgrandaj "kanajlaj" ŝtatoj, el kiuj kelkaj dancas ĉe okcidentaj kaj orientaj geedziĝfestoj kaj tial estas ege nefidindaj kaj altgrade danĝeraj, ekz.

Saŭdarabio aŭ aro da afrikaj ŝtatoj). Ĉu en Ruslando do regas faŝisma reĝimo aŭ ne (kio estas kontestata), koncerne la fizikan perforton, kruelecon kaj sovaĝecon, ekzemple en la armeo, sed ankaŭ en la socio mem, klare konstateblas tipe rusaj trajtoj kaj tradicioj, kiuj elformiĝis jam en la caris-ma tempo (ekzemple dum militoj) kaj plene aplikiĝis kaj kulminiĝis en la politika kaj socia sferoj de la komunisma, t.e. leninisma-stalinisma periodo. Tiuj samaj perforto, krueleco kaj sovaĝeco de rusaj armeaj fortoj, kiuj estas aprobitaj kaj subtenataj ankaŭ en la tavolo de rusaj politikistoj, ripetiĝis en la rusaj militoj (de Putin) en Ĉeĉenio, Sirio, Ukrainio kaj aliloke, tiel ke oni devas konstati, ke en la 21a jarcento principe malmulto ŝanĝiĝis. Klara ŝanĝo estas videbla en tio, ke kompare kun pli fruaj tempoj tiuj antaŭe izolitaj ŝtatoj parte enkondukis demokratiajn strukturojn por misuzi ilin kaj retransformi siajn ŝtatojn al diktaturoj. Due ili ricevis la aliron al la internacia financa cirkulado kaj al la liberaligitaj merkatoj, dank´ al la t.n. globaliĝo aŭ tutmondiĝo, kiu estis akcelita post la falo de la komunismaj reĝimoj en Eŭropo. Preskaŭ ĉiuj krimaj bandoj de la menciitaj landoj, en kiuj ili gajnis aŭ pli bone dirite akaparis al poltikan povon, profitis de tiu evoluo. Ŝajnas, ke, bedaŭrinde, la Okcidento entreprenis tro malmulte por kontraŭbatali tiujn misuzojn (mem permesante kunludi en tiuj faroj), de kiuj profitis mafiuloj, krimuloj kaj friponoj de la menciitaj ŝtatoj.

La aneksado de la kvar ukrainaj teritorioj fare de Rusio, kiu ĉiurilate malrespektas la internacian juron, estas nur surpapera kaj, kiel dirite, estis finfine nenio alia ol la sekvo de panika reago al la sukcesa kontraŭ-ofensivo de la ukraina armeo en la oriento kaj sudo de la lando. Kiajn konkretajn sekvojn ĝi havos por la milito en Ukrainio ankoraŭ ne estas antaŭvideble. Moskvo nun konsideras la kvar aneksitajn areojn kiel rusian ŝtatan teritorion, kiun la rusoj volas defendi per "ĉiuj rimedoj", kiel ili diris, ŝajne ankaŭ pensante pri nukleaj armiloj. La ukraina armeo nun sufiĉe sukcese provas regajni la okupatajn terenojn kaj liberigi ilin de la rusa okupado. Oni povas nur deziri al ĝi grandan feliĉon. A.K.

© www.planlingvoj.ch, oktobro 2022.

Definitiva versio (dec. 2022).